

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 107, junio 2013

Nia proverbo: La mensogo similas al vundo; eĉ kuracite ĝi postlasas signon.

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani 00355682080677, shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: gjergji\_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430, agimperaj@yahoo.it; Sajmir Beqiraj: (00355684030613, s\_beqiraj@yahoo.com; Nehat Sokoli: 00355682587699, nehatsokoli@gmail.com; Engjell Gusho: 00355692350111, engjellgusho@yahoo.fr, Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com; Luan Jaupi: luanjaupi@hotmail.com, tel 00355682165870, Enkela Xhamaj: xhamajkl@yahoo.com, 00355685135105

La enhavo

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

Kunlaboro de ILEI kun Gresillon kastelo

Pagis la kotizon

Ni dankas

Esperanto en Kosovo

El la leteroj

El Brazilo, Britio, Francio, Ĉinio, Hungario, Nederlando, Letonio

Disputo kun Aida

Korespondo kun prof. Corsetti

Impresoj el Albanio

Alvoko el konganino

Nia propagando

Nia retpaĝo jam pretas

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB

Esperantistoj en placo San Pietro

150 000 retuzantoj en Fejsbuko

Esperanto vendredo en Vroclavo

Kiel verki artikolojn por Esperanto

Informaĵoj

Novaĵservo kun selektitaj E-novaĵoj, R

La aktivecoj dum somero 2013 en la kastelo Gresillon

Esperanta Bitoteko en EU-financita datenbazo

Turismo

La turismaĵoj de la distrikto Pogradec

Decembro en Bona espero

Mia aventuro kun Esperanto

Politiko

Novaĵletero de Ian Fantom

Artikoloj

La normala lingvo

Tabakfumado inter la lernojunuloj

La ekspluatao de infanoj

Beletraĵoj

El la romano "La generacioj de Hankonatoj" de Ismail Kadare

El la noveloj de Ylljet Alicka

El la poeziaĵoj de Luljeta Lleshanaku

El la poeziaĵoj de Eqrem Basha

Anekdotoj

Anekdotoj de la lasta jaro

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

Triafoje kaj ankoraŭ sukcese

Depost 2011 kunlaboras ILEI kaj la kulturcentro Grésillon per okazigo ĉiuprintempe de lingvaj kursoj sekvataj de sesio de la KER-ekzamenoj. Mezvoje de la tria realigo ni povas konstati, ke la populareco de la aranĝo konserviĝas – la kastelo tute plenas. Kursoj disvolviĝas trinivele, kun kvin studhoroj tage – tri matene kaj du fruvespere. Ses komencintoj ricevas gvidon de ‘Ŝtonĉjo’ – iuj atingis jam bazan parolkapablon. La mezan nivelon prizorgas Christophe Chazarein, kies dekduo da kursanoj i.a. komune planas idealan E-vilaĝon. La gvidanto de la supera nivelo venas de ILEI: Stefan MacGill; ties 16 kursanoj trastudas la teatraĵon ‘La Martelo’ el la libro Nemave Edifi. Krome ĉiu ricevis taskon pretigi ĉ. 5-minutan prezenton de iu sia hobbio aŭ okupiĝo – tiuj montriĝis ekstreme variaj, fascinaj kaj diskutvekaj. La parolcentroco gravas por konvena pretiĝo por la ekzamenoj – tiuj okazos je ĉiuj disponeblaj niveloj: B1, B2 kaj C1. Praktike ĉiuj kursanoj plus kelkaj pliaj, submetiĝos al la ekzamenoj. Jen fruktodona kaj daŭrigenda kunlaboro.

Stefan MacGill

Estrarano de ILEI pri Juna amiko, kurso e125, retejoj, rilatoj kun UEA

Pagis la kotizon por 2013

Bardhyl Selimi 500 L

Gjergji Gusho 500 L

Engjell Gusho 500 L

Shaban Hasani 500 L

Sajmir Beqiraj 500 L

Estas petataj ĉiuj ceteraj membroj ne prokrastigi la pagon de la kotizo envorte.

Sajmir Beqiraj, la kasisto

Ni dankas

Antaŭ monato atingis nin pakaĵo da revuoj Juna Amiko, dec. Numero 2012. Tie aperas ampleksa artikolo ankaŭ pri Albanio.

Elkoran dankon al Malgosia Komarnicka, redaktoro de la revuo.

Nehat Sokoli

### Esperanto en Kosovo

Jaron post la fino de la milito en Kosovo, (1999), laŭ sugesto de prof. Corsetti kaj helpe de la itala esperantista federacio, ni certigis kelkdekojn da ekzemplerojn de lernokurso por albanoj, kiujn transdonis al la bibliotekoj de Prishtina, Prizren kaj Gjakova.

Ĉi jare, aprilofine, mi vizitis Prishtina-n kaj Gjakova-n kaj enmanigis, respektive, 10 ekzempleroj de la libro "Ĉu vi parolas Esperanton" al la nacia biblioteko en Prishtina kaj 5 ekzemplerojn al la urba biblioteko de Gjakova. Ilin akceptis la tieaj direktoroj, prof. Sali Bashota kaj Engjell Berisha.



Prof. Sali Bashota, maldekstre



Monumento de Patrino tereza en Gjakova

Samtage mi renkontis la dekanon kaj vicdekanon de Fakultato de Filologio kaj tiun de la Naturaj Sciencoj en Universitato de Prishtina kaj diskutis kun ili la eblecon de enkonduko de IL en ties institucioj. Ni disdonis inter la studentoj la flugfoliojn propagandantaj la gravecon de IL.



La enirejo de Filologia fakultato      La biblioteko

Tion faris ankaŭ en la klubejo-librovendejo "Dit-Nat" (Tag-Nokte), frekventata precipe de gejunuloj.



La kafejo-librovendejo Dit Nat      Studentino frekventulino

Esperable ankaŭ en Kosovo la e-movado revigliĝos baldaŭ.



Prishtina



Florvendejoj



Hotelo en Prishtina

Kun la verkisto Eqrem Basha

Baldaŭ promoviĝos kelkaj verkaĵoj de la Kosovaj aŭtoroj tradukitaj ankaŭ en Esperanto

Bardhyl Selimi

El niaj leteroj

Koran dankon karulo pro la apogo al la agado de Bona Volo.

Kaj gratulo pro via belega laboro favore al la E-movado.

Ghis poste. Fartu bone!

Samideane via, Paulo César, Brazilo [www.bonavolo.com](http://www.bonavolo.com)

Dankojn kara amiko! Agrablan semajnofinon! Post pasko mi precize tralegos vian bultenon. El korajn salutojn akceptu de mi kaj mia edzo. Belan printempon deziras

Adri Hungario

- Dankon pro via sendaĵo!

Amike, Vejdo, Ĉinio

Mi vere konfuzas reagi tre malfrue al ĉiuj viaj mesaĝoj, kiuj eniris mian ret-skatolon !

Nu, vi ja scias, ke emeritoj ne kapablas plenumi ĉiujn farendajn "taskojn", kiujn ili listigis dum ilia profesia vivo ! Kiel mi ofte diras al geamikoj... "Mi atendas mian duan emerito-tempon" por ĝui iom da saniga ripozo ! :-) ... ;-)... :-D ...

Memkompreneble mi nepre devas gratuli vin pro la abunda "dokumentaro" multifaceta, kiun vi daŭre ellaboras, kaj kiu meritas esti pli amplekse diskonigita ... Ĉion mi plezure legas, kaj bedaŭras, ke nia humila bulteno "la informilo" ne povas gastigi ĝin !

La numeron 161 mi ĵus finpretigis... 24 paĝojn tute kolore ! Ĝi atingos  
vian "stratskatolon" verŝajne ĉirkaŭ la 10a de aprilo.

.../...

Jes, vizito de via lando daŭre kuŝas en nia vojaĝ-kalendaro. Ĝin ni elvokos konkrete dum la "sunigata somero" ! Ankaŭ ĉeeston en Rejkjaviko ni ŝatus ! Imagu, ke je la unua UK ( 1977 ), la tutan kongresanaron salutis je la nomo de la franca partoprenantaro mia dua filino "Izabel"... Tiam ŝi estis 20 jar-aĝa ! Jes, forflugas latempo !

PS - Aldone, foto kaptita okaze de nia "printempa" kultur-semajnfino, 15/17-03-2013 ( "modernigata abatejo" -?!- 20km de VERDUN ).

Amiksamcelane,  
Pol kaj Mirej, Francio

Gratulon kaj felicitan paskon el la "sekreta" chef-urbo de la Europa Unio.

Kial vi tradukas la belan historian nomon "Shqipëria" en via esperanta versio en Albanujo? - En la alfabeto ordo de flagoj kaj de delegacioj oni konservas la originalajn nomojn de la landoj, alie, la alfabeto ordo estas malsama en preskaŭ ĉiu lingvo.

Samtempe en mult-lingvaj komunumoj mapoj, listoj kaj pli ol pli sur la vojoj la destinata ŝildoj montras la nomon en ĝia oficiala lingvo-versio de la loko. Esperanto devus esti universala kaj neutrala lingvo, tial - de mia Europa vid-punkto kun necesa mult-lingva komunikado - oni ne devus traduki oficialajn kaj geografiajn nomojn en Esperanto, same kiel en iu ajn nacia lingvo.

Ni devas lerni kiamaniere la aliulo nomighas kaj nomas sian ŝtaton, urbojn, regionojn kaj lokojn; sen tiu kono oni ne trovighas la lokojn kiam oni vizitas la landon

Saluton Shqipëria !

"Korajn salutojn!

Michael Cwik

Sijsjeslaan 22

B 3080 TERVUREN

Tel + Fax: +32 2767 4021

Mobil: +32 486 847 648

E-Mail: Michael@Cwik-online.net;

cwikbe@me.com

Respondo: Multan dankon por por viaj konstatoj, rimarkoj kaj sugestoj.

Vi tute pravas rilate nian oficialan nomon Shqipëria, same kiel rilate nian nacian heroon Skenderbeu kiujn ni ofte "tradukas" al Albanio, Albanujo, Skanderbeg..

Historie la nomo Shqipëria naskiĝis relative malfrue, post la 9a jarcento kiam evidentiĝis ankaŭ la etnio "shqiptar". Antaŭe la tuta teritorio de la Okcidenta Balkanio, de Danubo ĝis Adriatiko kaj de Trieste ĝis Prevezo nomiĝis Ilirio. Nur unu gento en meza nuntempa Albanio (aŭ Londona Albanio, kies limoj difiniĝis en la Londona Konferenco 1915) nomiĝis Albanoj. Sed Ptolemeo mencias ĝuste ilin okaze de partopreno en iu grava milito. Eble okazis kiel kun germanoj kiujn italoj nomas tedesci, slavoj nomas njemci, francoj nomas alemani, ĉu ne? Mem germanoj sin nomas deutch. Aŭ nederlandanoj sin nomas dutch dum la aliaj ilin nomas holandanoj, nederlandanoj ka.

Mi dankas ankoraŭ vin por via afabla amika mesaĝo. Mi ne certas ĉu mi sendis al vi jam nian dumonatan elektronikan bultenon. Jen la lasta aperinta hieraŭ.

Via amike Gjergji Gusho

Mi ne estas religiema, sed mi bonvenigas la baldauan alvenon de printempo. Estas evidente ke en la norda duonsfero tiu alveno tre gravas, kaj kristanismo ligis tion al la rakonto de la morto de Jesuo kaj lia reapero post morto. Tio estas tipika ekzemplo de magio bezonata de religioj, sed mi ne bezonas għin por konvinkighi ke Jesuo estis ege sagha viro kiu instruis valorajn lecionojn al siaj kredantoj.

Dum la periodo en kiu oni verkis la rakonton oni ne sciis pri la ekzisto de la suda duonsfero, kie oni ne bonvenigas la baldauan alvenon de vintro. Tamen, la influo de kristanismo atingis chiun parton de nia planedo, danke al la povro de la romia kaj brita imperioj.

Mi esperas ke iun tagon la homaro kondukos sin paceme, ĉar la scienco montras ke ne estas alia loko por la vivo, aparte de la sennombraj lokoj kiujn homoj kapablas imagi.

Mi subtenas la bonon kaj strebas agi afable.

Al vi mi deziras chion bonan.



Amike, David Kurtis

Kara, dankon por la paskaj bondeziroj. Estis interese legi ilin ankaŭ en via lingvo. La paska ovo estas interesa, gratulon al la kolektinto de multlingvaj bondeziroj. Mi plusendas ĝin al nia redaktoro Jozefo por eventuala venontjara uzo en IPR. Mia rimarko: ĝuste ĉar Slovakio estas kristaneca lando, oni anstataŭ tiu gaja bondeziro uzas jenan: Milostiplné a požehnané Veľkonočné sviatky = Gracoplenajn kaj benitajn paskofestojn :-

D. Amike Fejfi

Kara amiko,

Finfine, pro foresto dum pluraj tagoj, joannès enretigis vian version en la albana. Li hezitis inter du versioj (kun "w" kaj "tremao) kaj fine elektis tiun ĉi :

[http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto\\_langue\\_officielle\\_de\\_IUE/](http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_IUE/)

13) Shqip (albane/albanian) :

Esperanto, gjuhë zyrtare e Bashkimit Evropian, tani!

Ja pse kjo është e rëndësishme

Një nga parimet themelore të Bashkimit Evropian është barazia e gjuhëve dhe e kulturave. Me qenë se janë 23 gjuhë zyrtare, është e vështirë të respektohet ky parim. Dhe anglishtja është tani e paranduar në krahasim me gjuhët e tjera. Për shembull, anglishtja është gjuha e parë e punës në BCE. Kanë nënparësi qytetarët që nuk e flasin anglishten. Zgjidhni Esperanton, që është një gjuhë asnjansë lehtësisht e nxënëshme, si gjuhë e BE, për ta barazuar ndërlidhjen midis popujve evropianë. Më tej, të kesh një gjuhë të njëjtë mbarë evropiane, do lejonte një debat evropian ku të gjithë kombet ta kuptojnë njëri tjetrin; do krijonte një Evropë më demokratike. Për më tepër, sipas raportit Grin, nxitja e mësimi të Esperantos në vend të mësimi të anglishtes, do kursente çdo vit 25 miliard euro, sepse Esperanto është 5-10 herë lehtësisht më e nxënëshme se sa gjuhët e tjera.

Ju lutem ta nënshkruani këtë lutje

Ne qytetarët e Evropës dhe të botës, bëjmë thirrje për ta bërë Esperanton gjuhën e 24-t të Bashkimit Evropian, për një Evropë më demokratike dhe më të drejtë ndaj secilës gjuhë dhe kulturë të kontinentit. Zgjedhja e Esperantos me parapëlqim ndaj anglishtes, është hapi i mëtutjeshëm në ndërtimin e Evropës.

Mungon një debat në nivel evropian, Evropa nuk duhet të jetë vetëm një bashkim ekonomik por edhe një bashkim për popujt e saj.

Për ta mësuar pa pagesë Esperanton që tani:

Por senpage lerni Esperanton jam de nun :  
lernu.net

Raporti Grin :

L'enseignement des langues étrangères comme politique  
publique [www.google.com/url?q=http://www.ladocumentationfrancaise.fr/rapports-publics/054000678/index.shtml](http://www.google.com/url?q=http://www.ladocumentationfrancaise.fr/rapports-publics/054000678/index.shtml)

(Mësimdhënia e gjuhëve të huaja si politikë popullore): Ekzistojnë përkthime të pjesëshme apo të plota, të përfshira në Esperanto, të këtij raporti janë në këtë adresë :  
[lingvo.org/grin](http://lingvo.org/grin)

Nome de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, mi multe dankas Vin pro aperigo de lia artikolo Monda Tago de Akvo kaj de nia dankletero en via varia/interesa Bulteno.

Jen al via koro ĉi tiun penson de la verkisto kaj edukanto Paiva Netto:

Amo estas plej granda ĉampiono ĉe plej malfacilaj bataloj. Ĝi superas ĉiajn suferojn. Ĝi estas Dio.  
Kun varma saluto el Brazilo, atestime kaj bondezire,  
Maria Aparecida  
[www.bonavolo.com](http://www.bonavolo.com)  
<http://www.paivanetto.com.br/>

Nun la kurso baldaŭ finiĝos, restas nur unu fojo.

Samtempe kun la kurso en Gotenburgo mi sekvas ĉi tiun kurson (sube) pro la prononco. Mi pensas, ke ankau vi povas trovi la kurson de "goethe-verlag", ĉar unue mi povis provi ĝin, kaj poste por povi sekvi la tutan kurson mi pagis malgrandan sumon por 2 jaroj. Vi povus provi (senkoste) ekzemple esperanto-shqip kaj shqip-esperanto. La viro parolas tre rapide, sed la virino tre malrapide. Mi volus demandi vin, ĉu vi opinias, ke la elparolo estas ĝusta? Julietta havas iom alian prononcon.

Ŝi ja venas el Kosova. Mi ne scias, ĉu vi el Tirana havas saman prononcon, kiel homoj el Kosova. Ekzemple ŝi dras "mirupaafshim" (longa aa). Ŝi opinias, ke en mallongaj vortoj kiel "sot" tamen la vokalo devas esti mallonga. Mi ne povas audi tiun diferencon en la retkurso.

<http://www.goethe-verlag.com/book2/index.htm>

Amike

Birgitta, Svedio

Respondo:

Hola kara, espereble vi bonfartas.

Mi estas tre feliĉa ke aldonis plia amiko de albanoj kaj de la albana lingvo. Fakte ene de ne multaj lecionsesioj okazintaj for de la hejmo vi estas progresinta sufiĉe bone en la posedo de la albana.

Vi pravas, la prononco ankaŭ en la albana diferencas de loko al loko, bonŝance la diferencoj inter la ĉefaj du dialektoj: Gega, (meza kaj norda Albanio, Kosovo, Montenegro, suda Serbio) kaj Toska, (suda Albanio, Makedonio, norda Grekio) estas ne tiom grandaj kiel en la aliaj landoj ekz. en Italio.

Ĝenerale la diferencoj estas aspekto de riĉeco.

Via instruistino devenas el Kosovo, kie pro longjara okupado serba (dum la reĝa tempo antaŭmilita oni eĉ ne permesis albanlingvajn lernejojn) la lingvo ne tiom progresis kiel en la sendependa Albanio. Sed fakte la skribaj unuaj literaturaĵoj albanlingvaj aperis ĝuste en Kosovo (katolikaj pastroj Gjon Buzuku, Pjeter Bogdani, Pjeter Budi).

Ĝis la jaroj 1944-45 la oficiala lingvo en Albanio baziĝis sur la Gega kaj la alfabeto enhavis kelkaj literojn apartajn ebligantaj apartajn sonojn gegajn. Poste la oficiala lingvo ekbaziĝis sur la Toksa ĉar mem la komunista diktatoro estis toska..Nur post la jaro 1972 oni unuecigis la dialektojn favorigante la toskan kaj albanoj en ĉiuj teritorioj akceptis la unuecigitan literaturan lingvon. Tamen daŭras disputoj ankoraŭ precipe ne Kosovo kaj en nordoriento (urbo de Shkoder) por revizii tiun unuecigitan literaturan lingvon.

Aliflanke estas diferencoj inter la skriba lingvo literatura kaj parola lingvo. Ĉi lasta ankaŭ pro malklereco de parolantoj estas ege deformita. La fremdulo kiu eniras vendejon povas aŭdi anstataŭ la frazon Urdheroni! (bonvolu) la vorton Urno! kio ne speguliĝas en la vortaro. Aŭ anstataŭ Cfare deshironi? (Kion vi deziras) la vorton car do?

Eble tio okazas en ĉiu lando.

Interese, mi kreskiĝis ĉefe ne Tirana en familio de instruistoj kaj mem estis instruisto. Pro tio kutime oni ne komprenas ke mi devenas el Kosovo kie vivis ĝis unu jariĝo..Sed en malatentemaj okazoj mi ellasas el mia buŝo vortojn prononcitajn en la gega dialekto.. Eble multo estas ankaŭ parte heredita.

Mia amiko instruita la albanan en Kosovo dum la jaroj 45-50 rakontis iutage ke lia kolemino serba kiu instruis la serban al serbaj gelernantoj, estis konfesinta: mi miras kun miaj gelernantoj, ili skribas serbe kaj pensas albane! Kion signifas tio? Eble pri praa deveno albana de tiuj infanoj kies prapatroj konvertiĝis al ortodoksa religio serba de la katolika religio albana..

Ankoraŭ dankon kara, ĉion bona al vi kaj sukcesplenan konkludon de via kurso de la albana.

Via Bardhyl

Estimataj,

La ĉi-jara printempo estas la plej malvarma kaj malfrua printempo kiun mi spertis. Hieraŭ (la 28-an de aprilo) mi povis vidi ekfloradon de persikarboj kaj vere sentis alvenon de printempo. Oni diras ke la vintro de 2012 estus enamiĝanta al la printempo de 2013, ili ne volas disiĝi.

Estimataj, ĉi numero de Informilo de Ĝemelaj Urboj tre malfrue alvenaskiel la ĉi-tiea printempo, sed vi ŝatas ĝin kiel vi ŝatas printempon, mi pensas.

Kiel vi jam scias esperantistoj el 127 landoj povas legi nian bultenon, nun mi havas etan deziron ke la vortoj "Ĝemelaj Urboj" volas havi esprimojn (tradukojn) de diversaj naciaj lingvoj. Bv sendu al mi vian tradukon per aldonaĵo se vi tio interesas vin.

Printempo revekas ĉion. Ĝi flugtuŝis la tegmenton de la urbo, superflugis la vastan stepon, trapasis la kradon de la ĝardeno, kaj transsaltis la kronon de la arbo por saluti ĉion. Ĝi konformigas la plej belan koloron, rondire ekspozicias sin en ĉiu anguleto. Ĝi emocias viajn okulojn, ĝi skuas vian animon!

La bulteno Informilo de Ĝemelaj Urboj deziras doti la printempon per propra koloro, kaj pli deziras akompani vin trapasigi la printempon.

Wu Guojiang, komisiito de la projekto Ĝemelaj Urboj

Adreso: Fushun Xinfu-Qu, Qianjin-Lu, 45-Hao, 113015 Fushun, Liaoning, Ĉinio.

Telefono kaj fakso: (024) 52650322;

Retadreso: ghemelurboj@yahoo.com.cn amikeco999@21cn.com

Disputeto kun Aida

Bardhyl:

Saluton karaj, por tiuj kiuj havas intereson ekkonu iomete la Albanan mi enesperantigis kursetin aperinta sur reto.

Laŭ la albana eminenta verkisto Ismail Kadare la Albana estas inter 5-6 ĉefaj lingvoj de Eŭropo kaj 12-13 lingvoj de la mondo...ne pro la nombro de ties parolantoj sed pro antikveco kaj originaleco.

Mi estus preta pluhelpi respondante al viaj eventualaj demandoj koncerne la temon.

Rimarko de Aida:

Mi iom j'etrigardis. Vokabularo (anglalingva vorto) en esperanto estas vortaro, vokaloj estas ne nazaj, sed nazalaj k. t. p.

P. s. C'efa malsukceso de esperanto estas en tio, ke amatoroj al cetera mondo kaj profesiuloj prezentas minimuman kvaliton kaj fanfaronas kvazau pri mirakloj.

Estus bone, se antau publikigo trarigardus iu specialisto.

Mi certe ne legos g'is fino Vian tradukitan mallongan kurson (de la Albana), c'ar mi havas plurajn aliajn okupojn pli gravajn kaj pli interesajn por mi en nuna momento. Ankau mi ne korektos la tekston.

Vi tutcerte povas trovi iun lingviston profesian en Via lando au inter Viaj geamikoj alilandaj por tiu laboro.

Mi nur j'etrigardis por informig'i pri la maniero de prezento kaj atentigis, ke enestas malg'ustaj'oj.

Lau mia opinio, ni faru nur tion, kion ni kapablas fari precize, senmanke (au senerare) ol ni faru c'ion eblan en dubinda kvalito. Se nepra estas deziro fari ion certan, ni evoluigu niajn kapablojn g'is perfekteco kaj nur tiam faru ion publike prezenteban. Lau mi, ni au faru perfekte, au entute ne faru por ne malhelpi per niaj faroj.

Estas ridinde, kiam kuracisto instruias, kuiristo kuracas k. s. - g'uste tio estas eco prezenti Esperanton al "ekstera medio".

Estas nur mia opinio, kiu ne estas deviga por iu ajn.

Fartu bone!

AmikeAida

2013/4/8 Aida Cizikaite <aiduze@gmail.com>

Respondo:

Dankon kara, mi ĝojas ekaŭdi de vi, eĉ tra ĉi tiu publikigo. Mi notos viajn korektojn validajn kaj atendas aliajn farotaj de vi, espereble. Vi tute pravas kiam akcentigas la valoron de bonaj scioj en Esperanto. Sed pli bone labori ol senlabori, ĉu ne? Ankoraŭ dankon.

Reago nova de Aida

Saluton!

Por ne lasi por longa tempo kaj ne forgesi mi respondas nun.

Mi havas du profesiojn - juro (Moskva universitato) kaj filologio (Vilnius universitato), ankaŭ mi studis interlingvistikon (universitato en Poznan), sed la unua estas hobia kaj profesie mi okupig'as nur pri la dua.

Ankaŭ mi memoras Vin vidi ie iam (eble ankaŭ paroli?), sed ne tiom precize kiel Vi. Mi havas problemojn kun memorkapablo.

Jes, ekzistas tiaj homoj, kiel Zamenhof, kiuj estas perfektaj kaj en profesia kaj en s'atokupa kampoj au en pluraj, ekz., Leonardo da Vinci, c'u ne? Sed, bdaurinde, ili estas nur raraj esceptoj inter ni ordinaraj.....

Jes, mi estas iom pli juna ol Vi, sed tio, laŭ mi signifas nenion.

Pri neniu malmodesteco mi iam ajn havis la ideon.

Vidinte la kurson mi simple informis, ke mi vidis kelkaj malg'ustaj'ojn j'etrigardinte mallonge. Mi konsideras tion amika ago.

Vi skribis al mi kun demando, eble mi aldonos pliajn korektoj, sed mi certas, ke mi tion ne faros, do mi informis Vin, ec' se ne tuj. Pardonu. Mi opinias, ke tio decas. Vi ja devas scii, c'u atendi ion de mi, c'u serc'i alian helpanton.

Kaj mi dividis kun Vi mian opinion pri pli bone fari ol entute ne fari, au fari nur plej bone au ne fari, respondante al Via demando. Kiel mi aldonis - estas nur mia opinio, kiu estas deviga por neniu. ;)

Jes, en ILEI (kaj ne nur) rondoj laboras multaj homoj, kiuj estas multe pli kleraj kaj pli spertaj ol mi. Mi c'iam g'ojas, se mi havas eblon lerni de ili.

Mi esperas, ke nun c'io klaras.

En mia respondo enestas nenio plia, ol legeblas, t. e. nur tio, kio estas dirita.

Fartu bone!

AmikeAida

Dankon kara, amike Bardhyl

Korespondo kun prof. Corsetti

(Temis pri venigo en Albanio de rusa kursgvidantino, Tatiana, verŝajne aŭguste. Tatiana sukcese instruis antaŭe en Indonezio)

Mesaĝo de Bardhyl:

Fakte ni ne suferas de manko de instruantoj de Esperanto, nin mankas gestudentoj, kiuj aktuale, kiam ankaŭ por albanoj estas ne plu problemo libera moviĝo tra Sengen zono, ne tro interesiĝas pri Esperanto ol pri la angla. Albanoj estas tradicie ne idealistoj, sed pragmatistoj, certe tio estas grava manko nia.

Tamen ni klopodas ke per ĉiu rimedo allogi la homojn, la edukajn instituciojn, la politikistojn al nia internacia lingvo.

La ĉefa problemo kiel vi bone rimarkis, estas la laborigo de niaj membroj. Ekzemple la eksa prezidanto Agim Peraj, loĝanta en Shengjin apud la urbo Lezhe, instruanta ankoraŭ en la elementa lernejo nenion raportis pri novaj kursoj en sia lernejo kaj plendas ke la kruroj ne permesas lin eĉ partopreni iun kunvenon en Tirana.

Same kondukas Luan Jaupi, malnova aktivisto el la urbo Durrës, kiu plendas ke estas malsana, des pli ke antaŭ du jaroj perdis lian filon dum akcidento per motorciklo. Mi penige persvadas lin aktiviĝi.

Ne paroli pri la unua prezidanto de nia asocio Gafur Muĉo kiu apenaŭ aŭdiĝas, cetere estas suferinta notinde de alkoholismo.

La filinoj kaj nepino de la forpasinto Zef Mjeda eksa Honora membro de UEA same ne aktivis, nek klopodas publikigi la manuskriptojn tre valorajn de Zef (granda vortaro 30 000 vortoj albana-itala-esperanto kaj kompleta ciklo pri bravuloj, t.e. legendoj, mitoj, fabeloj albanaj).

Restis mi, Shaban Hasani aktuala prezidanto, samaĝa, s-ro Gjergj Gushe el Pogradec pli ol 70 jara, Engjell Gushe el Korça 67 jara, Nehat Sokoli el Kukës, senlabora instruisto de biologio, Rita Permeti eksa aktivisto malnova, longajn jarojn paralizita en hejmo.

Enkela Xhamaj deĵoranta en alta institucio ankoraŭ ne aktivigis serioze. Dume multaj niaj eksaj diplomistoj en Bydgoszcz tute ne kunlaboras kontraŭe rigardas nin kolere kaj seniluziigitaj kvazaŭ ni kulpas ke la ministrejo pri edukado ne agnoskas la diplomojn liveritajn de AIS al ili, ĉar neniu en San Marino pretas alglui al iliaj diplomoj tiel nomatan apostilan stampon. Pro tio kelkaj el ili estis maldungitaj el entreprenoj kie komence eniris labori..

La oficiala lingva politiko albana tute malhelpas la disvastiĝon de Esperanto, eĉ de la aliaj lingvoj krom la angla.

Tia estas la situacio kvankam ne esperiga sed kompreneble ne malkuraĝiganta nin, kiuj daŭre klopodas plu vivi la movadon enlande, malgraŭ ties kostojn ankaŭ materie.

Ni dankas vin sincere por via konstanta sindediĉo ankaŭ al nia movado kaj esperas je kunlaboro kun ĉiuj.

Ni restu en kontakto, amike Bardhyl

Respondo de profesoro:

Bardhyl:

| Problemo estas ke en aŭgusto la homoj ferias, la lernejoj estas fermitaj.

Mi komprenas tion.

| Pli bone estus ke Tatjana alvenu en nia lando septembre kiam ĉi tie ni promovigos kelkajn librojn tradukitajn en Esperanto kaj same ni havos plurajn gastojn el Pollando, ĉekape Tomasz Chmielik.

Verŝajne ni pensas pri malsamaj aferoj. Tatjana pensas instrui Esperanton, kaj vi pensas pri prezentado de libroj.

| Dume mi pretas korespondi kun Tatjana kaj konatiĝi reciproke. Same interkonsenti pri aferoj kiujn ni povus realigi kunlabore ĉitie. Nelaste pri prelegoj en universitato, en la fremdlinga fakultato, en fakultato de filologio, eĉ ankaŭ en Kosovo.

Bone. Ŝi estas universitata instruisto pri la franca.

| Certe la akomodiĝo dum kelkaj tagoj en Tirana malmultekostus al ŝi.

Ĉu Tatjana estas rusino, aŭ ukrainino? Ĉi kaze ni praktikus ankaŭ la rusan kun ŝi.

Ŝi estas rusino. Vi trovas ŝian adreson inter la adresatoj de ĉi tiu mesaĝo. Sed en la fino devas temi pri projekto, kiu produktas komencatajn esperantistojn kaj revivigas la Albanan Ligon. La eŭropa komisiono iom fortostreĉe povas trovi monon por ŝia vojaĝo, sed la programo devos esti interkonsentita.



| La ĉefa problemo kiel vi bone rimarkis, estas la laborigo de niaj membroj. Ekzemple la eksa prezidanto Agim Peraj. . . Luan Jaupi, malnova aktivisto el la urbo Durres, kiu plendas ke estas malsana, des pli ke antaŭ du jaroj perdis lian filon dum akcidento per motorciklo. . . . Gafur Muĉo. . . filinoj kaj nepino de la forpasinto Zef Mjeda . . .

Tiel okazas ĉie.

| Restis mi, Shaban Hasani aktuala prezidanto, samaĝa, s-ro Gjergj Gushe el Pogradec pli ol 70 jara, Engjell Gushe el Korĉa 67 jara, Nehat Sokoli el Kukës, senlabora instruisto de biologio, Rita Permeti eksa aktivisto malnova, longajn jarojn paralizita en hejmo.

Enkela Xhamaj deĵoranta en alta institucio ankoraŭ ne aktiviĝis serioze.

Bone, ni baziĝu je ĉi tiuj. Invitu ilin aliĝi al la listo albanaj-esperantistoj kaj ni komencu seriozan plurvoĉan debaton pri la estonteco de Esperanto en Albanujo. Eventuale provu fari renkontiĝon en Tirano.

| Dume multaj niaj eksaj diplomigintoj en Bydgoszcz tute ne kunlaboras kontraŭe rigardas nin kolere

Oni certe ne povas fari ion per ili.

| La oficiala lingva politiko albana tute malhelpas la disvastiĝon de Esperanto, eĉ de la aliaj lingvoj krom la angla.

Kiel en aliaj landoj.

| Tia estas la situacio kvankam ne esperiga sed kompreneble ne malkuraĝiganta nin, kiuj daŭre klopodas pluvivigi la movadon enlande, malgraŭ ties kostojn ankaŭ materie.

Bone. Vi estas la sola aktiva esperantisto en Albanujo en ĉi tiu generacio, laŭ mia kompreno. Ni senespere devas trovi iujn aliajn.

Amike, Renato

Impresoj pri Albanio

Mi tre ĝojas ricevinte vian leteron.

Tuj mi eksentis la samajn emociojn kiujn mi travivis en via lando.

Afablajn, bonkorajn homojn kiujn ĉirkaŭis min donis tiam la plej varmajn emociojn.

Tre kortuŝajn travivaĵojn kiujn mi travivis kiam en unua vespero de nia alveno mi- latvino kaj Gunar-svedo eniris malgrandan vendejeton por manĝeti kebabon. Ho tio por mi ĝis nun estas anekdoto Nr.1 en mia vivo. Ni ambau estis taksitaj kiel muslimanoj au islamanoj, nu mi ne scias ĝustan vorton. Dum kiam

mi embarase, strese kaj iom timeme demandadis ĉu io en la vendejeto estas manĝebla, tre bonkora vendistino kuraĝigis min per natura rideto kaj diris, ne timu ĉio estas manĝebla, estas kokinaĵo. Mi admiris, ke ni ambau - veraj eksetrlandanoj estis pritaksitaj kiel lokaj konatoj, eĉ kiel familianoj. Vere mi loĝis iom for de aliaj partoprenantoj de la aranĝo, sed mi ne bedaŭris. Vesperaj - noktaj promenadoj donis la mi plenan impreson pri la lando.

Nokte funkcias vendejoj. Irante mi vidis: nokte virino eliras de la pordo de sia loĝejo, por aĉeti necesejan paperon ĉe apuda vendejeto????? Neniam mi tion vidis ĉe ni en Latvio. Mi ankaŭ loĝis en domo, kie sur la unua etaĝo estis iam diurna vendejo. Tamen mi mem neniam eliris surstrate nokte, se finiĝis necesa papero!!!! Mi timis ebriulojn, kiuj aĉetas alkoholon.

Funkciis eĉ nokta bazaro. Nekredebla vigla nokta vivo, natura vivo. Ne estas kazino au restoracioj, simple estas homoj kun homoj egalaj sur strate, parolantaj, ridetantaj, helpemaj.

Homoj en Albanio ankoraŭ restas ne tuŝitaj de "malbone odoranta kapitalismo". Bedaŭrinde ni en Latvio perdis nian liberecon. Nun ni povas aĉeti manĝaĵojn laŭ Europaj reguloj, en grandegaj vendejaĉoj kun diversaj E, ne naturaj.

Vere dum 2012. mi multege vojaĝis. Post Albanio mi vizitis Vjetnamion kaj Sicilion. Neniam plu mi sentis min tiom sekure, libere, bonhumore.

Grandan dankon al Bardhyl pri unika ebleco viziti solan en EUROPO landon kiu ankoraŭ estas pura, natura kaj libera, kaj tute ne sovaĝa laŭ malbona sento.

Mi dankas ankaŭ Shaban Hasani pri ebleco loĝi ĉe lia familio. Mi esperas, ke mi ne tro ĝenis lin. Fakte li ja ne scias, sed li estis la unua ekzemplo de albana kulturo. Kion li diris, ĉiu devis obei. Mi eklernis lian kutimon matene, por mi frumatene, eliri de la hejmo, kiel al laborloko... al kafejo. Ĉe ni en Latvio viroj tiel ne faras. Sed estas ja tre bona kutimo.

Sincere, Mara Timermane  
Letonio

Alvoko el Konganino



Mi nomiĝas Pascaline Luhinzo Mushamalirwa, estas patrino de kvar gefiloj, vidvino. Mi instruis matematikon. Sed ne estas nun emeritulino, ĉar la pensia sistemo ne ekzistas en nia lando. Mi instruas senpage ambaŭ matematikon kaj esperanton al mezlernejoj en domo farita el pajlo jam putriĝanta.

Mi estas konganino el la orienta parto de la Demokratia Respubliko de Kongo, provinco Suda Kivuo, urbo Bukavu, apud la lago Kivu. Tie mi gvidas e-societon. Mia pliaĝa filo, Mana, 28 jara, senlaboras, sed ege deziras plustudi universitaton. Tio maleblas ĉar la studkostoj jare atingas 1200 USD. Imagu: ni kolektis la fruktojn de nia agrokampo kaj el la vendo enspezis entute 100 eŭrojn!

Tiel li intencas perlabori per etaj aferismoj kiel ekzemple fotado, transportado per motorciklo, vendado de konstrumaterialoj, starigo de sapfarejo, aktivecoj tiaj tre bezonataj ĉi tie. Por fari tion estas necesa kapitalo respektive 100, 800, 2000 kaj 1500 euroj.

Ni estas certaj ke, ene de mallonga tempo, la filo povus ŝpari sufiĉe da mono por pagi la studkostojn en la universitato, same plivigli la esperanto- movadon en nia regiono.

Esperable je solidareco de nia samideanaro enmonde estus bonvola ĉiu monhelpo kiun povus administri mem UEA kunordinante kun niaj lokaj e-organizoj.

Jen, je ĉiu eventualo, la donitaĵoj niaj:

Demokratia Respubliko Kongo,

provinco Suda Kivuo,

urbo Bukavu,

kvartalo Ruzizi,

numero 1226,

tel:+243842645309,+243853154376.

Retadreso:

La filo, lorrathanase@yahoo.fr

Mi: pascalineluhinzo@yahoo.fr

Nia propagando

Nia retpaĝo

Danke al la helpo de samideanino el Aŭstralio ni jam havas retpaĝon.

Jen la retejo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html>

Por eniri uzu la nomon [Bardhyl@mondeto.com](mailto:Bardhyl@mondeto.com), kaj la pasvorto Zamenhof.

Email: [CEO@mondeto.com](mailto:CEO@mondeto.com)

Phone: +612 6493 2992

Mobile: +61 4 2917 0739

Skype: Penelope Vos

[www.mondeto.com](http://www.mondeto.com)

Education for Global Citizenship

Shaban Hasani

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB

Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La uzado en sciencaj kaj profesiaj kampoj tamen postulas – krom la entuziasmo – ankaŭ termin-arojn kaj fakajn esprimojn.

Antaŭ ol verki iun ajn sciancajn aŭ fakajn artikolojn oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj. Nia Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB intencas helpi ĝuste en tiu tereno.

Por koncentri la fortojn, en STEB ni deponas verkojn ĉefe el sfero de teknikaj sciencoj, kies produktado estas pli komplika pro la kunligitaj teknikaj ilustraĵoj, figuroj, tabeloj ktp.

Grandan parton de la biblioteka enhavo prizorgis kunlaborantoj de la Esperanto-Centro Eventoj (Szilvási László, Mészáros István, Vári Csilla, Axel Ország-Krysz, k.a), kiuj ekde la jaro 2000 retajpis aŭ skanis kaj provlegis plurcentojn de malnovaj, ne plu haveblaj libroj, revuoj, artikoloj. Grandan dankon ankaŭ al ĉiuj entuziasmaj eksteraj helpantoj, kunlaborintoj!

Ni invitas ankaŭ vin kunlabori! Kun sincera danko ni akceptas vian kunlaboron ĉu per pretaj materialoj, ĉu per informo pri ilia trov-loko, aŭ per ajna alia maniero.

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB estas trovebla ĉe: <http://www.eventoj.hu/steb/>

L.S. / Ret-Info

ESPERANTISTOJ EN PLACO SANKTA PETRO

La esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por la 24a sinsekva fojo. Ne okazis la plurlingvaj salutoj de la Papo, sed tio ne malpliigis ilian entuziasmon.

**NOTO POR REDAKCIOJ:**

**ONI POVAS LIBERE KOPII ĈI TIUJN FOTOJN. SED BONVOLU MENCII LA FONTON (WWW.IKUE.ORG):**



250.000 fideluloj ĉeestis en placo sankta Petro kaj en la fronta aleo, tiom ke, je iu momento, oni devis fermi la placon. Sekve, kelkaj el la esperantistoj ne sukcesis eniri por teni la panelojn. Nur post la fino de la Meso la grupo unuiĝis. La paneloj, pro la svarma ĉeesto, fariĝis "makulo" meze de oceano da personoj.

















Ĉeestis Giorgio Pagano de E-Radikala Asocio









De maldekstre: Filomena Canzano. Marija Belošević, Renato Corsetti, Giovanni Daminelli, Jitka Skalická, Isabel León Fonseca, Patrizio Cilli kaj Elio Bonomolo







Dum kelkaj minutoj literojn "dua T" kaj "O" tenis Raffaele del Re kaj Alessandro D'Amati.






Kaj ili restis longtempe videblaj dum la fina siglo de la elsendo de la itala televido

Spektu la filmon laŭ la dezirata formato:

AVI (15 MB)

I-Pod (m4v - 3 MB)

Android (mp4 - 1,6 MB)



Diretta realizzata dalla  
Direzione Produzione TV  
CPTV di Roma

TG1 direttore  
Mario Orfeo

SAMSUNG






Kiel kutime, kelkaj volis havi fotografion kun la paneloj









Knabetoj uzis la panelojn por kuri ludante.





Fotas ilin Ranieri Clerici

---

150 000 Esperanto uzantoj en fejsbuko

Ĉu vi scias, ke 150.000 personoj uzas Esperanton ĉe Facebook? Kontrolu:

<http://http://www.facebook.com/pages/Esperanto/112347282113529?rf=112143842135599>

Informis:

Aloísio Sartorato

Rio, Brazilo

#### ESPERANTA VENDREDO EN VROCLAVO

La 17an de majo 2013 en Vroclavo, Pollando, okazis du sukcesaj eventoj kune preparitaj de esperantistoj kaj neesperantistoj.

En la Elementa Lernejo n-ro 9 je la 12a horo komenciĝis la unua Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Ĝi anstataŭigis la pli frue ekzistantan esperantlingvan konkurson pri kristnaskaj kantoj. Ĉar tiu konkurso ne ĝuis popularecon kaj ne allogis partoprenantojn, mi proponis ŝanĝi ĝian formulon, kaj tiel ekestis la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Ĝi estos okazigata ĉiujare, ĉiun trian vendredon de majo, en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto.

La ĉi-jaran Festivalon kune preparis Silezia Esperanto-Asocio kaj la Elementa Lernejo n-ro 9 en Vroclavo. Ĝi okazis sub patronadoj de Mila van der Horst Kolińska, konata esperantistino, honora membro de UEA kaj ILEI kaj ankaŭ sponsoro de la Festivalo, kaj de la senatano de Pola Respubliko prof. Edmund Wittbrodt, iam ministro pri klerigado en la estraro de Jerzy Buzek, kaj nun prezidanto de la Senata Kolegio por Subtenado de Esperanto.

La festivalejo estis belege ornamita de la lernejaj instruistinoj. Oni ankaŭ preparis manĝaĵojn por la partoprenantoj, instruistoj kaj gepatroj, kiuj akompanis la junajn kantantojn.

La publikon kaj la partoprenantojn salutis la direktorino de la lernejo s-ino Anna Szanin kaj la kunordigantino de la evento Małgosia Komarnicka, kiu reprezentis Silezian Esperanto-Asociation. La Festivalon gvidis Małgosia Komarnicka helpe de Wojtek Ławnikowicz, kiu kantis Esperantajn kantojn, kaj de Helena Biskup, kiu deklamis pole kaj Esperante popularajn versaĵojn.

En la kategorio "solisto" la ĵurio aljuĝis tri premiojn. Ricevis ilin: Kamila Jasionowicz el Złotoryja (la unua premio), Julia Jeziorowska el Vroclavo (la dua premio) kaj Wiktoria Karyś el Góra (la tria premio). En la kategorio "koruso aŭ ensemblo" la ĵurio decidis aljuĝi nur unu premion. Ĝin ricevis ensemblo el la



Esperanta Klubo en Góra. La ĵurio pritaksis ne nur muzikajn, sed ankaŭ lingvajn valorojn. Ĉiuj ĉeestantoj ricevis diplomon, kaj la premiitoj, diplomon, pokalon kaj donacopremion. Premioj estis disdonitaj ankaŭ al instruistoj, kiuj motivigis kaj preparis siajn lernantojn partopreni la festivalon. Ĉiuj ĉeestantoj revenis hejmen tre kontentaj, promesante plivastigi sian repertuaron de Esperantaj kantoj. Ili certe estos bonaj ambasadoroj de Esperanto.

En la ĉi-jara Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj ĉeestis ĉefe neesperantaj infanoj kaj gejunuloj, kio estis por la organizantoj granda surprizo. La E-medion reprezentis nur la Esperanta Klubo el Góra, gvidata de Lidia Nowak.

La sekva festivalo okazos la 23an de majo 2014, kaj ni jam nun invitas esperantistojn ĉeesti ĝin.

Posttagmeze, je la 15a horo kaj duono, okazis renkontiĝo kun la japana poezio hajko, titolita "Hajkoj per internacia lingvo desegnitaj." La honora patrono de la evento estis la japana ambasadoro en Pollando s-ro Makoto Yamanaka. La eventon iniciatis Małgosia Komarnicka (el Silezia Esperanto-Asocio), kiu kun Anna Ejfler (el la hajko-sekcio de la Universitato de la Tria Aĝo ĉe la Ekonomika Universitato) gvidis tiun unikan renkontiĝon. Ĝi estis unika, ĉar la aŭtorinoj, kiuj antaŭ du semajnoj eldonis poeziaĵ-volumeton titolitan "Zatrzymać chwilę..." ("Haltigi momenton..."), legis siajn poeziaĵojn ne nur pole, sed ankaŭ en belega Esperanto, kvankam ili ne posedas nian lingvon. Krome la publiko povis aŭskulti belan klasikan muzikan, kiun plenumis lernantoj de la Muzika Lernejo Karol Szymanowski en Vroclavo kaj de la Vroclava Lernejo de Ĵazo kaj Distra Muziko. La aŭskultantaro (ĉefe reprezentantoj de la Ekonomika Universitato) estis ravitaj per la neforgesebla etoso de la renkontiĝo. La aranĝo montris, ke hajkoj estas vortbildoj, prezentantaj la mondon en plej konciza kaj ĝisfunda maniero, kaj la Esperantaj tradukoj de Danuta Kowalska (el Nowy Sącz) kaj Teresa Nemere (el Toruń) pruvis, ke Esperanto efektive scipovas transdoni ĉiaspecajn nuancojn de homa penso. La renkontiĝo montriĝis bela kaj efika akcelo de Esperanto, de tiu specife japana literatura formo kaj ankaŭ de la japana kulturo en Pollando.

Dum tiuj du ege sukcesaj aranĝoj mi konstatis, ke neesperantaj medioj atendas nin, esperantistojn, kaj volonte entreprenas kunlaboron kun ni. Tamen ni devas memori, ke la hodiaŭa tempo postulas de ni agadon modernan, ne arkaikan, alie la ekstera mondo perceptos Esperanton kiel mortan arkaikaĵon, kaj nin, kiel sendanĝerajn frenezulojn.

Małgosia Komarnicka



Kiel aperigi artikolojn pri Esperanto en la gazetaro de via regiono

Danke al la kunlaboro inter Brian Barker kaj Emilio Cid rilate al la Gazetara Kampanjo ĉirkaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso io relative granda estas okazanta. Vi ĉiuj povas profiti de tiu tre forta gazetara kampanjo de UEA por sukcese kaj senpage aperigi artikolojn pri Esperanto en via regiono.

- Se vi iros al [http://uea.org/vikio/Projekto\\_126\\_-\\_Justa\\_Komunikado](http://uea.org/vikio/Projekto_126_-_Justa_Komunikado) vi trovos ĉiujn proponojn de Brian pri tekstoj al la gazetaro kaj pri grafikaj simboloj por afiŝoj kaj pro la Tago de Esperanto (26 de julio).

- Se vi iros al [www.gazetaro.co.nr](http://www.gazetaro.co.nr) vi trovos proponon por artikoloj al viaj lokaj gazetoj pri la fakto, ke vi mem aŭ via samlandano vojaĝos eksterlanden al internacia kongreso, kie miloj da homoj el centoj da landoj diskutos plurajn temojn, en unusola lingvo komprenata de ĉiuj. La artikolo estas jam tradukita al pluraj lingvoj.

- Se vi iros al la grupo en Fejsuko/Vizaĝlibro/Facebook <https://www.facebook.com/groups/gazetaro> vi trovos la grupon de homoj, kiuj interesiĝas pri la kampanjo.

Ni sugestas ke vi sendu la artikolojn al la gazetaro tuj post la 20a de junio. Indas unue telefoni al la redakcio, informi pri la temo kaj demandi, al kiu oni sendu. Post kelkaj tagoj telefoni denove por demandi ĉu ĝi bone alvenis, kaj ĉu estas aldonaj demandoj pri la temo aŭ pri Esperanto.

Kunlaboru kun UEA pri informado!

renato corsetti  
[renato.corsetti@esperanto.org](mailto:renato.corsetti@esperanto.org)

Informaĵoj

Novaĵservo kun selektitaj E-novaĵoj

Mi speciale alighis al chi-tiu listo por gratuli la albanajn esperantistojn pri la starigo de ilia asocio.

Vi jam preterstrebis la serbajn esperantistojn, kiuj ankoraŭ - se mi estas bone informita - atendas la oficialigon de nova Serba Esperanto-Ligo.

Johan Derks, nederlandano, nomata "defendantato de serboj"

PS: Mi donis al mi tasketon kolekti pli da Esperanto-klubo por la retpagharo de Esperantoland.

Ghis nun aperis neniuj kluboj el Albanujo en tiu retpagharo. Mi invitas vin rigardi

<http://www.esperantoland.org/grupoj/mapo.php?mapo=17>

au kontakti min por enigo de viaj donitajhoj.

Dankon pro viaj bondeziroj.

Johan Derks

P.S.

Mi ne havas la rajton shanghi mapon, kiu apartenas al la asocio Esperantoland.

Cetere la fakto, ke mi faras ĉi-tiun laboron estas ĝuste inspirita de la konvinko, ke tute ne gravas al kiu lando ni apartenas.

La aparteneco al fiksa landa asocio laŭ mia opinio fojfoje estas bremsilo al starigado de translimaj kontaktoj.

Eĉ mi povus defendi la tezon, ke se UEA konsistus nur el kluboj, anstataŭ landaj asocioj, ĝi pli bone florus.


La estonta klubo en Kosovo povas tamen mem entemigi la aferon de la limoj de Kosovo ĉe Esperantoland, date kiam ili estos enskribitaj.

Sed pli bone ĝi komencu tiun temon ĉe la supro, t.e. ĉe UEA mem.

Vi povas mem enigi grupojn en [http://www.esperantoland.org/grupoj/map\\_euro.php](http://www.esperantoland.org/grupoj/map_euro.php).

Johan Derks

Esperanto-grupoj



lasta ŝanĝo: 2013-04-01

© EsperantoLand

La kastelo Gresillon

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj: somera programo (semajnoj turisma, artamatora, alternativa, infana, teatra), aŭtuna feriado oktobrofine kaj al jarfina festego kun novjara festeno.

Vidu detalon rete en [www.gresillon.org/somero](http://www.gresillon.org/somero) aŭ [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

Kontaktu nin telefone al +33-2.41.89.10.34 aŭ retletere al [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org) aŭ letere al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, France.

Pli longe:

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj dum somero, aŭtuno kaj jarfino, ĉiam kun E-kursoj kaj aktivaĵoj:

6-13.julio: Turisma Semajno por ŝatantoj de turismado kaj ekskursoj al reĝaj kasteloj, de francaj historio,

kulturo kaj lingvo, vidu en [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

13-20.julio: Art-Amatora Semajno por hobiaj artistoj kaj ŝatantoj de teatro, dancado, kantado, muziko kaj grafika arto, vidu en [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

20-27.julio: Alternativa MOJOSejo (por junuloj kaj pri alternativaj temoj) por vegetaranoj, verduloj kaj piratoj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, migremuloj, biciklantoj kaj tendumantoj, vidu en [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

3-10.aŭgusto: Festa Semajno speciale por infanoj kaj familioj kun beboj, por adoleskantoj kaj junuloj, vidu en [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

10-17.aŭgusto: Teatra Aktora Semajno por amantoj de teatro originala en Esperanto ; dezirantaj labori kun profesia aktoro, vidu en [gresillon.org/s5](http://gresillon.org/s5)

26.oktobro-2.novembro: AŬTUNE, la ferioj: Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj, vidu en [gresillon.org/autune](http://gresillon.org/autune)

28.decembro-2.januario: Jarfina FESTego kaj Novjara FESTeno laŭ franca maniero kun maskobalo

Resumo de somera programo en vidu en [gresillon.org/somero](http://gresillon.org/somero)

Jara kalendaro en vidu en [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

Ne hezitu kontakti nin telefone al +33-2.41.89.10.34

aŭ sendu retmesaĝon al [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

aŭ skribu al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, France.

+ + + fotoj kaj bildoj + + +

nova logbildo <http://gresillon.org/IMG/jpg/logbildoPS56k.jpg>

eksa logobildo [http://gresillon.org/IMG/jpg/logo\\_mce7.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/logo_mce7.jpg)

nigra desegno [http://gresillon.org/IMG/png/LogDesgno\\_90k\\_348x238px.png](http://gresillon.org/IMG/png/LogDesgno_90k_348x238px.png)

nigra skizo <http://gresillon.org/IMG/jpg/CroquisClaireSpanavello.jpg>

kolora desegno <http://gresillon.org/IMG/jpg/GresillonPeintYvesC.jpg>

fotoj:

kastelo trans lago <http://gresillon.org/IMG/jpg/AlonaAkimenko1220.jpg>

kastelo sub neĝo [http://gresillon.org/IMG/jpg/kastelantauo\\_neghoFLJ.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/kastelantauo_neghoFLJ.jpg)

flanka turo trans heĝo [http://gresillon.org/IMG/jpg/JoelGrandjean\\_k12.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/JoelGrandjean_k12.jpg)

foto el aero [http://gresillon.org/IMG/jpg/bildkarto\\_NRizzoni.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/bildkarto_NRizzoni.jpg)

grupo kun ĉinoj [http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-08\\_semajno4a\\_Schumann\\_3374.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-08_semajno4a_Schumann_3374.jpg)

jarfina kostumbalo [http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-12\\_jarfino\\_Coquisart.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-12_jarfino_Coquisart.jpg)

junuloj dum FESTO [http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-08\\_FESTOgr.jpg](http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-08_FESTOgr.jpg)

Antaŭdankas Bert Schumann por Greziljono.

## Esperanta Bitoteko en EU-financita datenbazo

Bitoteko, la elektronika biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio, nun estas alirebla pere de la prestiĝa eŭropa datenbazo Europeana. La reta servo Europeana estas parte financata de Eŭropa Unio, kaj pere de ĝi, krom la materialoj de la biblioteko de HEF, estas alireblaj interalie kolektoj de British Library en Londono, Rijksmuseum en Amsterdamo kaj Luvro en Parizo.



Ekde la 15-a de marto 2013 eblas trovi dokumentojn el la Bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio en la eŭropa reta biblioteko Europeana.

En septembro 2012 Hispana Esperanto-Federacio (HEF) subskribis interkonsenton kun la hispana Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sporto por reguligi la provizon de la metadatenoj de sia Bitoteko al Europeana, pere de Hispana, kiu mem agadas kiel loka kolektanto de metadatenoj. La interkonsento reguligas ankaŭ la uzadon de la provizitaj metadatenoj far Europeana kaj la Ministerio.

La novaĵo pri la aliĝo de Bitoteko al Europeana estis publike anoncita la 15an de decembro 2012 kadre de la Simpozio pri la valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno (Jornada sobre el valor del esperanto como fenómeno intercultural), organizita de Madrida Esperanto-Liceo. Kaj laŭ la plano, Bitoteko devintus jam aperi en Europeana tiun tagon: HEF kaj la Ministerio intense laboris tiucele. Sed tiam la prizorgantoj de Europeana prilaboris la ĝisdatigon de la sistemo, pli longdaŭran ol atendite, kaj la integriĝo de Bitoteko en Europeana povis efektiviĝi nur en februaro.

El teknika vidpunkto, por adaptiĝi al Europeana, Bitoteko devis instali la postulatan Specifon pri Semantikaj Europeana-Elementoj (Europeana Semantic Elements Specification, ESE), normigi la Unuformajn Risurcajn Identigilojn (URI, Uniform Resource Identifier), kaj adopti la licencon Creative Commons por garantii la taŭgan mastrumadon de la aŭtorrajtoj.



[Albumo de Maria Posenae. 029-1], La esperantistoj en Valencia la 16an de septembro 1909 / 5a Internacia Kongreso, 5-11 septembro 1905, Barcelona

**Kuvailu:** Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet  
**Teksto:** Universala Esperanto-Asocio. Kongreso (ŝa. 1909, Barcelono). Esperantistoj  
**Ajarkodo:** 1909; <http://samum.org/ima/1909>  
**Tipo:** Image  
**Alto:** Universala Esperanto-Asocio. Kongreso (ŝa. 1909, Barcelono). Esperantistoj  
**urno:** urn:www.esperanto.eu:11013/1372  
**ĵurnalo:** Leipzig : Eldonejo Esperanto  
**Alinistoj:** Bitoteko (Federación Española de Esperanto = Hispana Esperanto-Federación)  
**Sistemo:** Hispana  
**Providing country:** Spain  
 Auto-generatit tago

Europeana estas projekto de la

Eŭropa Unio por krei publikan eŭropan bitotekon konsistantan el bibliotekoj, muzeoj kaj arkivaj dokumentoj, oficiale lanĉita la 20an de novembro 2008. Ĝi celas doni aliron al la kultura kaj scienca eŭropa heredaĵo. Por atingi tiun celon, ĝi kolektas, riĉigas kaj faras alireblaj la priskribajn metadatenojn de la dokumentoj kiuj konsistigas tiun heredaĵon. Europeana estas unika alirpunkto al pli ol 19 milionoj da specimenoj (libroj, pentraĵoj, filmoj, sonregistraĵoj, muzeaĵoj kaj arkivaj dokumentoj) bitigitaj tra Eŭropo. Pli ol 1.500 eŭropaj institucioj prizorgantaj kulturen heredaĵon havigas dokumentojn al ĝi. Iliaj nombro kaj geografia amplekso daŭre kreskas.

Bitoteko alportas al Europeana metadatenojn de dokumentoj ne nur el sia propra kolekto, sed ankaŭ el kolektoj de aliaj organizaĵoj, kiel, ekzemple, Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet, Museu d'Esperanto de Subirats kaj Madrida Esperanto-Liceo. Kaj ĝi restas malferma al aliaj kunlaboremaj institucioj, kondiĉe ke ili plenumu la postulojn pri kvalito al kiu Bitoteko sindevigis.

En la nuna momento Bitoteko enhavas pli ol 2.400 dokumentojn. Konsulti rekte la Bitotekon garantias aliron al la plej ĝisdata datenbanko, ĉar la apero de la bitotekaj rikordoj en Hispana kaj Europeana ne estas aŭtomata. Ambaŭ kolektas la metadatenojn ne ĉiutage, kvankam ja regule kaj sufiĉe ofte.

Plie, ni instalas programeton en la bitoteka retejo, kiun Europeana havigas al siaj provizantoj de metadatenoj. Tiu programo ebligas, per la bitoteka serĉilo, trovi samtempe kaj la dokumentojn el la propra datenbanko kaj la ceterajn taŭgajn rezultojn el la datenbanko de Europeana, se ili ekzistas.

La fakto ke Bitoteko troviĝas en Europeana gravas ĉar ĝi integriĝis en reto pri interŝanĝo de metadatenoj, kiu ebligas strukturi la sciojn pri Esperanto kaj plifaciligi la esploron de ĉiuj interesitoj pri la esperantaj lingvo kaj kulturo, kiuj kutime ne havas facilan aliron al tiuspecaj dokumentoj.

Cetere, tio ampleksigas la videblecon de nia kulturo kaj prezentas nian lingvon rolanta je la sama nivelo kaj por la samaj celoj kiel la ceteraj prestiĝaj kultur-lingvoj.

Ana Manero

Biblioteko Juan Régulo Pérez



Hispana Esperanto-Federacio

Saluton al amikoj en Albanujo:)

Bonvole notu ke afiŝo en la albana lingvo nun pretiĝis. Vidu kaj bonvole uzu en via fejsbuka paĝo, uzu en universitatoj, kaj metu en bibliotekojn ktp.

<http://www.linguistic-rights.org/bildoj/Dita-e-Esperantos--Me-26-korrik-2013--Drejtasi-gjuhesore---EsperantoTago-albana-42x59cm-72dpi.jpg>

Informoj pri la progreso de la lingvo troviĝas ĉe –

[http://uea.org/vikio/Unua\\_komuniko\\_en\\_la\\_albana](http://uea.org/vikio/Unua_komuniko_en_la_albana)

Bonvole uzu tiun preparatan tekston, kun laŭbezona redakto, al gazetoj, televido, radio ktp.

Mi algluas apartan emblemon kio uzeblas ekzemple por t- ĉemizoj kaj fejsbuko.

Bonvole uzu ; ne estas kopirajto!

Kore salutas.

Brian Barker.

Komisiito pri informado - Universala Kongreso 2013.

Edukado.net

Meze de aprilo 2013 la porinstruista portalo [www.edukado.net](http://www.edukado.net) lanĉis retan kvizludon RISKO.

Jam la nomo sugestas, ke ne sufiĉas nur koni niajn lingvon, historion kaj kulturon, sed por sukcese "riskumi" necesas ankaŭ iom da strategio kaj bonŝanco.

Ĉiun tagon la ludantoj ricevas maksimume tri demandojn pri Esperanto: po unu pri lingvo, kulturo kaj movado. Kompreneble la programo al ĉiu ludanto lotumas aliajn demandojn, do la bonŝancoj varias de tago al tago. Nur tiuj, kiuj bone respondis al almenaŭ unu el la du unuaj demandoj, rajtos elekti halti aŭ pluludi kun la ŝanco duobligi la poentojn aŭ perdi ilin. Se oni respondos bone la trian demandon la poentoj duobligos, sed se oni respondos malĝuste oni perdos la poentojn gajnitajn en tiu tago! Necesas respondi la demandojn ene de indikita tempolimo.

La poentoj sumiĝos ĉiumonate, kaj fine de la monato la gaintoj povas elekti el la proponitaj premioj. Estos plia premio por la absoluta gajninto de la tuta jaro. La premioj venas parte de la Fondaĵo Edukado.net, sed estas multaj asocioj, eldonistoj, aŭtoroj de libroj kaj diskoj, kiuj subtene al la ludo oferis siajn verkojn. Pliaj donacoj bonvenas. <http://www.edukado.net/adminejo/risko/premioj>

Jam en la unuaj tagoj estis granda intereso pri la ludo. En la unua semajno 250 personoj registriĝis por riskummi. Ĉirkaŭ 100 membroj de la retejo ludas ĉiutage kaj kun scivolo rigardas dum la tago plurfoje sian pozicion sur la ranglisto.

La ludon elpensis Katalin Kovats, la redaktoro de la retejo, kaj la 1200 diversajn demandojn kolektis kaj enretigis ŝi mem kaj la dana kolego Mogens Rude Andersen.

La demandoj ofte ne estas facilaj; citaĵoj, parigoj de aŭtoroj kaj verkoj, datoj kaj okazaĵoj, difino de vortoj, rekono de kantoj, misprononcitaj fonemoj aŭ ekzemple famuloj de la movado, kono de gramatikaj terminoj aŭ konkretaj lingvaj demandoj donas grandan varion kaj starigas la ludanton antaŭ defiojn.

Pere de la ludo la paĝaro celis ne nur ludon kun valoraj premioj, sed ĉefe klerigan agadon, ja ĉiun nokton, fine de la koncerna ludtago ĉiu ludanto, kiu tion abonis, ricevas retmesaĝon pri siaj poentoj kaj la tiun tagon nesciitaj demandoj, kun la ĝustaj respondoj.

La ludo estas individua ludo, sed kluboj kaj grupoj povas decidi konkuri inter si pere de la reto. Al instruistoj de grupoj de meznivelulojn aŭ progresantojn ni konsilas direkti la kursanojn al la kultura ludo.

RISKO funkcios kontinue, tra monatoj kaj jaroj, kaj la redaktoro esperas grandnombran partoprenon.

En majo komenciĝos nova lud-monao kun novaj ŝancoj. Jam nun valoras elprovi la ludon por akiri spertojn.

Ĉiu el vi estas bonvena riskumi en la LUDO-sekcio de [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

Rekta ligo: <http://www.edukado.net/ludoj/risko>

Katalin Kovats, redaktoro

Libroj en esperanto en [Edukado.net](http://www.edukado.net)

Titolo:	Amuziĝu per matematiko (Partoj 1 kaj 2)
Verkinto(j):	Bardhyl Selimi
Kategorio:	Libroj
Lingvo(j):	Esperanto;
Priskribo:	<p>Amuzaj matematikaj taskoj kaj pensigaĵoj, verkitaj de la nia albana kolego por liaj mezlernejaj klasoj.</p> <p>La dupartan materialon, entute ĉ. 250 ni publikigas senŝanĝe, kaj esperas ke multaj el la Esperanto-instruistoj mem amuziĝos kaj trovos en la materialo multajn erojn, kiujn ili povos uzi ĉu en sia instrulaboro, ĉu dum Esperanto-renkontiĝoj.</p> <p>Jen kelkaj frazoj el la antaŭparolo de la aŭtoro:</p> <p>"Mia pli ol 40 jara sperto de instruado de matematiko estas konfirminta ke la gelernantoj ĝenerale, sed ankaŭ tiuj je notindaj scimankoj en matematiko aŭ ne interesataj pri ĝi, altiriĝas kiel per magneto de ĉiu problemo je distra karaktero sed je matematika enhavo.</p> <p>Kial do?</p> <p>Unue, mi opinias ke tiaj problemoj ne postulas la scipovon kaj la aplikeblon de la malfacilaj kaj severaj matematikaj teorioj, sed nur iom da logiko kiun posedas ĉiuj homoj kaj eble simplajn sciojn pri la subjekto kiujn ili estas lernintaj en la elementa lernejo, pro kio ili sentas sin relative certaj. Plue, la problemoj preparolataj havas kutime praktikan karakteron, do prezentas ian intereson por la ĉiutaga vivo.</p> <p>Aliflanke, por la instruisto estas tre grava la traktado de tiaj problemoj ĉar tiamaniere li povas vekti la intereson pri matematiko ĉe la lernantoj, sed ankaŭ ĉi lastaj edukiĝas per la rezonada pensmaniero."</p>

Eldonloko:	Tiranë
Eldonjaro:	2009
Paĝnombro:	245
Pezo:	ĉ. 3400 + 3100 KB
Kreodato:	2013-04-16 23:29:25
Lasta redakto:	2013-04-16 23:33:32
Montroj:	20
Dosieroj:	<p>Elŝutoj de ĉiuj dosieroj sume: 14; Viaj elŝutoj: 0</p> <p>Amuziĝu per matematiko - Parto 1  .pdf  Elŝutoj sume: 9  Kreodato: 2013-04-16 23:30:47</p> <hr/> <p>Amuziĝu per matematiko - Parto 2  .pdf  Elŝutoj sume: 5  Kreodato: 2013-04-16 23:31:48</p>

Top of Form

Bottom of Form

Turismo

(Turismo en Albanio)



Pogradec kaj ties distrikto

Gjergji Gusho

Tushemisht/Drilon

La akvofontoj de la rivero Drilon troviĝas apud la vilaĝoj Tushemisht kaj Guras, je 4 km for Pogradec, ĉepiede de la montetoj kaj aspektas tre bele, nekompareble.

Ĉi tiu natura monumento povas vizitiĝi se oni sekvas la vojon Pogradec- Tushemisht- Doganejo.

La rivero Drilon estas larĝa akvofonto kiu daŭras pluen sian fluadon al la lago de Pogradec (aŭ Ohrid)..La akvo elfluas de la lago de Prespa, tra la Mali i Thatë (Seka Monto) kaj eliĝas eksteren kiel larĝan akvofonton aparta je rapideco 7 kubaj metroj po sekunde. Ĝi estas ĉirkaŭita per densa herbaro kaj posedas riĉan bestan mondon.

Ĉi tiu loko estis preferata por pasigi la feriojn ankaŭ de Enver Hoxha (Hoĉĵa, eksa albana diktatoro komunista).

La turistoj povas viziti la ties lastan ripozdomon kiu estas transformiĝinta al hotelo-restoracio.

La vilaĝo Lin

Lin estas malgranda duoninsulo ĉe la okcidentaj bordoj de la lago de Ohrid (Pogradec) kun bela vilaĝo samnoma. La domoj estas konstruitaj el ŝtono kaj brikoj rande de la malvastaj stratetoj kovritaj per vinberlaŭboj. Sude de la lago, apud la vilaĝo Buqezë, troviĝanta proksime de Lin, je la profundeco 2-3 m troviĝas kelkaj palafitoj<sup>1</sup>.

Ĝi estis logloko je lageca tipo, samkiel estis ankaŭ Maliq en la distrikto de Korça.

---

<sup>1</sup> Palafitoj estis pratempe lignaj domoj starigitaj sur lignaj trunkoj kaj super la akvo.



Estas legendoj dirantaj ke la duoninsulo de Lin estis bela insulo je densa herbaro. La vivo en la duoninsulo de Lin komenciĝis en la unua periodo de la fera epoko kaj daŭrigis ĝis la praa Mezepoko.

Dum la arkeologiaj fosadoj, estas malkovrita pratempa kristana baziliko kun eksterordinaraj mozaikaĵoj sur ties planko, kiu datiĝas ekde la kvara-kvina jarcentoj post Kristo. La mozaikaĵoj havas kelkajn belajn figurojn kiel fiŝojn, birdojn ks.

### La vojo "Egnatia"

En la teritorio de la distrikto de Pogradec troviĝas debranĉiĝo de la ĉefa vojo Egnatia, fama vojo ekde la tempo de romia okupado, kiu ligis Romon kun Kostandinopolo. En ĉi tiu debranĉiĝo estas kelkaj pontoj kaj fragmentoj de tiu pratempa vojo, kiuj komenciĝas de Ponto de Golik (vilaĝo Golik), Ponto de Terziu Tajloro) en la vilaĝo Proptisht, la ponto en la valo de Llëngë kaj la ponto en la vilaĝo Niçë.

La vojo sin distingas pro la grandaj ŝtonoj (ŝtona pavimo) troviĝantaj en la gorĝo de la vilaĝo Llëngë apud la bordoj de la rivero Shkumbin.

### La Malsupra Selcë

Survoje al Tirana, je la fundo de Qafa e Thanës (Kolo de Thana), se vi turniĝas maldekstren kaj denove maldekstren, atingos al la vilaĝo Selca e Poshtme (Malsupra Selcë). Tie vi povas viziti la kvin monumentecajn tombojn en la loko nomata Kalaja (La kastelo), trovita en pozicio videbla la la valo de Shkumbin. Ĉi tiu kastelo (albane: kala) estas ludinta unuarangan rolon dum la iliro-romiaj kaj iliro-makedonaj militoj. Proksime de tiu kastelo, pasas debranĉiĝo de la vojo Egnatia.

Tio kio iĝas konata ĉi lokon, estas la kvin monumenetecaj tomboj gravuritaj sur amasa ŝtonego de la loko Gradishtë, apud la vilaĝo.

La arkeologiaj esploroj montris ke temas pri evoluinta ekonomia kaj kultura centro je granda graveco el la tria-kvara jarcentoj antaŭ Kristo.



La urbo kaj la lago



Mapo de Albanio- dekstre la lago

## DECEMBRO EN BONA ESPERO

Ludoviko Zamenhof, kiu multan tempon de sia vivo pasigis ĉe la lumo de kandeloj, vekigis sub la ruĝa ĉielo de matena krepusko. La suno, rapide leviganta, malfermas antaŭ liaj okuloj mirindan pejzaĝon de la brazila savano; la virga naturo en 360 gradoj da horizonto. La kreinto-Zamenhof rigardas, el sia unika en la mondo monumento, direkte al la majesta Monto Baleno, videbla detale en la kristale pura aero. Ĝi ne ŝajnas altega, malgraŭ sia alteco de preskaŭ 1600 m., ĉar Bona Espero situas je 1300 m. super la marnivelo. Sed sur la 14-a paralelo de la suda hemisfero. Jen la sekreto de ĝia milda klimato, pro kiu la tuta regiono ŝuldas sian nomon Alta Paradizo.

Ĉiumatene mi kutimas saluti la Majstron kaj tuj kuras al la lago, por gimnastiki kaj naĝi. La lago ricevas sian akvon el la abunda fonto. Ĝi estas pumpata supren al la sidejo do Bona Espero per la antikva metodo sen uzo de energio. Tiu kurioza vidindaĵo estas nomata „ŝafofrapo”. De la lago mi rekuras al la manĝejo, alarmita de sonorilo. Ĝi sonas kvarfoje tage: je la 8-a, 12-a, 15-a kaj 19-a horoj. La menuo estas kutime vegetarana kaj sin bazas sur la propra, centprocente ekologia legomejo, kiu funkcias la tutan jaron. Sed ne ekzistas malpermeso pri viando. Oni povas bonguste viandumi en restoracioj de la proksima urbeto Alto Paraiso.

Laŭvole kaj daŭre ĉiu rajtas kompletigi sian menuon per fruktoj, plukeblaj rekte de arboj. Oranĝoj, citronoj, bananoj estas fruktoj konstantaj, aliaj aperas laŭ siaj natursezonoj: ĵabutikaboj, pitangoj, moruoj, guaranoj, avokadoj, gujavo, gravioloj ktp. Gigantaj jakvoj kaj bongustegaj mangoj

komenciĝas maturiĝi en decembro. Tiu monato estas aparte interesa. Tiam la savano transiras decidite de la seka sezono al la pluva. Interesa observokampo por naturamantoj. Renaskiĝas la indiĝena flaŭro, kiu dum la tuta jaruono transvivis sen eĉ guto da pluvo.

Vekas min bruego de... Ne tiu de aŭtomobiloj, sed de birdoj, vekigintaj pli frue. Amaso de etaj kolibroj, kriemaj papagoj, grandbekaj tukanoj kaj aliaj birdoj, sennomaj por mi, ignoranto pri ornitologio. Rapide subiranta suno, bildigas la tutan ĉielon per fascina spektaklo de multkolora abstrakta pentroarto. Tiam mi pensas: La belo estas vere sentebla, kiam oni povas ĝin dividi kun aliaj homoj. Kaj mi aŭdas: Do dividu ĝin. Venigu esperantistojn ne plu por volontule labori, sed por ripozi en mirinda naturo. Tiel diras Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj jam preskaŭ 40 jarojn volontulas en Bona Espero, senlace kaj senenue.

Bona Espero eniras la fazon de restrukturiĝo. Dum la pasintaj 55 jaroj ĝia ĉefa celo estis edukado de infanoj kondamnitaj je analfabeteco. Dume okazis en Brazilo granda progreso sur la kampo de edukado. Tio ebligas al Bona Espero turni sian atenton al aliaj statutaj celoj. Venis la tempo transformi ĝin en internacian Esperantan Kulturcentron. Bona Espero ne intencas rezigni pri infanoj, ĉar sen ili ĝi ne estas imagebla. Sed oni prenas malgrandulojn de 5 ĝis 8 jaroj, kiuj estas pli efike edukeblaj. Same neimagebla estas Bona Espero sen esperantistoj, sed nun oni ne devas varbi volontulojn por longa estado, sed ĉiujn aliajn, kiuj volas fari mallongan viziton.

La nova celo estas, ke Bona Espero fariĝu vivanta peco de Esperantujo. En la tuta mondo ne ekzistas simila fenomeno. Jen la proprietaĵo de la Esperanto-movado leĝe konfirmata, je surfaco de 10 kvadrataj kilometroj, kun kompleta infrastrukturo kaj moderne ekipitaj konstruaĵoj, en la belega naturo. Esperantistoj, venu decembre por ripozi en tiu mistera mondangulo. Kaj festi Kristnaskon kune kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj en 1973, do ekzakte antaŭ 40 jaroj unuafoje metis siajn piedon sur la promesitan teron... La festego estos ne-imagebla!

Estas du vojaĝvariantoj de la 6.12.2013 – 5.01.2014 kvarsemajna aŭ dum 20.12.2013 – 5.01.2014 – dusemajna. Krom Bona ESPERO eblas viziti Sao Paulo, la ĉefurbon Brasilia kaj Rio de Janeiro. En Bona ESPERO dum la tuta tempo mi gvidos Festivalon de miaj Esperanto – filmoj pri kiuj ni diskutos. Vojaĝu kun ni – aliĝu ĉe Esperantotur en Bydgoszcz, Pollando.

Roman Dobrzyński

Mia aventuro kun Esperanto

Multaj homoj, eksciinte pri mia lernado de Esperanto demandas min: kial? pro kio? por kio? Fakte, ankaŭ mi ne scias tion, tamen mi supozas, ke cio komencis pro mia amo al lingvoj kaj al ... televidprogramoj. Sed mi parolu de la komenco.

En la jaro 2008, ĉe pola televido reaperis post kelkara paŭzo pola versio de mondkonata, brita programo Who Wants To Be A Millionaire?, en la pola Milionerzy. Malgraŭ ke tiam mi estis nur 10-jara, mi jam sciis, ke ĝi rigardindis, do mi spektis ĉiun epizodon. Samtempe mi komencis interesiĝi pri planlingvoj.

En jaro 2009 mi komencis krei mian unuan planlingvon, kiun mi nomis larmocka lingvo (larmocke M'Aiamat'us M'ish). Mi disvolvadis ĝin malrapide, sed konstante, dum preskaŭ du jaroj, sed hodiaŭ ĝi nur ridetigas min. Mi ankaŭ multe legis pri aliaj planlingvoj, ĉefe pri interlingvao. Mi eksciis, ke oni povas ellerni ĝin dum 15 tagoj. Hodiaŭ mi scias, ke tio eblas ĉe neniu lingvo, sed tiam mi kredis je tio. Mi volis lerni ĝin, sed mi ne povis trovi iun lernolibron aŭ ion alian.

Decembre de la jaro 2010, en Milionerzy aperis demando: „Kio estis Ludoviko Zamenhof, kreinto de artefarita lingvo Esperanto?”. Tiun vesperon mi decidis lerni iom pri la gramatiko de Esperanto kaj mi jam sciis pri la finaĵoj: -i, -is, -as, -os, -o ktp., tamen plu mankis al mi vortoj, pri kiuj mi tute ne volis „perdi” la tempon. Ĉio ŝanĝiĝis januare, en 2011 j. La 29-an, unu tagon antaŭ mia semajna vintroferia ekskurso al Zakopane mi pensis, ke anstataŭ enui mi povus lerni vortojn – kaj tiel okazis. Ĝis nun je demando: „Kiam vi eklernis Esperanton?” mi respondas: „La 29-an de januaro 2011”.

Tiel komencis mia aventuro kun Esperanto, kiu plu daŭras kaj senĉese surprizigas min per novaj okazaĵoj, interesaĵoj kaj personoj, pri kiuj mi verŝajne neniam eksciis sen la lingvo inter-nacia. Ankoraŭ en la jaro 2011 mi ekiris al gimnazio. Tie mi ekkonis Ewa Kordylewska, pranepinon de konata astronomiisto, Kazimierz Kordylewski. Ŝi estis la sola persono, kiu sciis, kio estas Esperanto. Malgraŭ tio, mi ne volis kredi, ke ŝia avo, Leszek Kordylewski estas esperantisto. Ĝis kiam ŝi donis al mi Skype-an kontakton al li...

Tiam komenciĝis multaj tekstaj interparoloj kun sinjoro Leszek; la temoj estis diversaj. Mi ne timis skribi, ĉar mi pensis, ke neniam lin renkontos. Tio estis eraro. Jam oktobre de 2012 j., al Krakovo el Ĉikago alflugis avo de Ewa kaj ni renkontiĝis. Poste li informis min, ke kiam Ewa diris al li pri iu esperantisto-samklasano, li pensis, ke jen iu spritulo lernis kelkajn vortojn. Kaj jen estis mi, kiu vere volis paroli esperantlingve.

Komence de ĉi-jaro mi kun Ewa faris tri filmetojn pri Krakovo, en Esperanto, kiuj certe ne estas perfektaj, tamen mi iom fieras pro ili.

En januaro de la jaro 2013 mi unuafoje venis al Kulturdomo „Podgórze”, kie kutime renkontiĝas anoj de Krakova Societo ESPERANTO. Kaj tiel tio daŭras ĝis hodiaŭ, tamen se iu demandus min antaŭ 2 jaroj, ĉu mi povus post du jaroj skribi artikoleon en Esperanto por esperant-lingva revuo - mi sendube neus.

Tobiasz Kubisiowski

Krakova Societo ESPERANTO

Międzynarodowy Dzień Przyjaciela Internetowego

La Internacia Tago de Interreta Amiko



## Politiko

Novajletero de la Veromovado de Berkshire, Britio, por aprilo-majo 2013 (2013-05-09)

- Rakonto de Bostona bombado ne havas sencon
- The Daily Mail kaj la 911-(vero)-neantoj
- Margaret Thatcher: Ĉu tirano aŭ uzato?
- Enfiltrantoj: Kio estas en la afero por ili?
- Ne nepre estas tiel
- Kiu vere estas Tony Farrell?
- Nun regulaj kunvenoj por Keep Talking

Plurajn tagojn en aprilo la britaj tradiciaj amaskomunikiloj estis en paralizo sekve de la morto de Margaret Thatcher. Tiam en Usono tuta urbo estis en milita paralizo sekve de la Bostona bombado. Ni vivas en danĝeraj tempoj.

\* Rakonto de Bostona bombado ne havas sencon

Tuj vidinte la unuan eksplodon en la televida novaĵo venis en mian menson la vortoj "falsa flago", same kiel mi atendus, ke estu la kazo por iu ajn familiara kun la mensogoj de 9-11, aŭ de Operacio Gladio. Dum mi sekvis la raportadon en la televidaj novaĵoj de BBC mi gajnis klaran impreson, ke estas kvazaŭ la tuta legteksto estis antaŭverkita. Kial ili pacience klarigis al ni pri la afero anstataŭ eniri kaj eltrovi ĝuste kio okazas?

La paraliziĝo de Bostono aspektis kiel iaspeca provekzerco por la milita juro kiun ni dum iom da tempo anticipis. Aperis nekongruaĵoj ĉie. Amaso da materialo aperadis en la alternativaj amaskomunikiloj, sed nun eĉ la tradiciaj amaskomunikiloj en Usono pridemandadas la oficialan rakonton. Nick Kollerstrom produktis bonegan revuon pri tio en sia retejo (<http://terroronthetube.co.uk/2013/04/19/3835/>).

Unu maltrankviliga aspekto de tio estis, ke la rusa registaro ŝajne subtenis la oficialan rakonton, ke la fratoj Tsarnaev estas teroristoj, dirante, ke ili avertis Usonon antaŭ iom da tempo. Sed nun mi scivolas, ĉu ili ne tutsimple kuraĝigis la okcidentajn amaskomunikilojn ekzameni la misteran rolon de la federacia polico FBI en tio. Se jes, ŝajne ili sukcesis; Nick inkluzivis videon de usona televido, en kiu oni demandas, ĉu tio povus esti fals-flaga operacio.

Iama diplomata Craig Murrey diras, ke la rakonto pri Tsarnaev havas nenian sencon (<http://www.craigmurray.org.uk/2013/04/the-official-trarnaev-story-makes-no-sense>). Do kun sento de senŝarĝiĝo mi aŭdis la trian de majo, ĵus verkota pri tiu afero, ke Russia Today elsendadas en sia programo The Truthseeker [La Veroserĉanto] raporton pri la Bostona bombado kiel fals-flaga operacio (<http://beforeitsnews.com/u-s-politics/2013/05/boston-false-flag-goes-mainstream-boston-bombing-what-you-arent-being-told-2446520.html>).

La ĝino nun eliris la lampon. Venu, Daily Mail, kial ne diri al la brita publiko ĉion pri la afero?

\* The Daily Mail kaj la 911-(vero)-neantoj

The Daily Mail ekspluatis la aferon, misfamigante Dzhokhar Tsarnaev kiel '9/11 denier' [911-neanton], kion ili asertis en sep artikoloj en du tagoj. Kio estas '911-neanto'? Estas orvela parolturno, ĉar ĝi devus signifi '911-vero-neanto', esprimo certe aplikebla al The Daily Mail. Estas video titolita 'Psychologists help 9/11 Truth Deniers' [Psikologoj helpas al 911-Vero-Neantoj], kiun nepre studu The Daily Mail. (<http://911blogger.com/news/2011-09-20/youtube-psychologists-help-911-truth-deniers>).

Ŝajne The Daily Mail volas iri ĝis iu limo en priesplora ĵurnalismo kaj kampanjado por ke la vero estu konata, sed ne plu. Ili faris bonegan laboron por inversigi la publikan opinion en la kazo de la murdo de d-ro David Kelly, kaj ili nun malkaŝas sekretajn procesojn en Britio, per kiuj iuj homoj estas jam enkarcerigitaj (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2318636/No-jailings-secret-Judges-issue-new-ruling-contempt-cases-Mail-exposes-sentencing-scandal.html>). La trian de majo ilia redaktora komentario pri sekretaj arestoj titoliĝis 'Kuregante kapunue antaŭen al sekreta ŝtato' (<http://www.dailymail.co.uk/debate/article-2318623/Charging-headlong-secret-state.html>). Do kio malpermesas al ili malkaŝi la mensogojn de 9-11?

Ne povas esti io pli malstabiliga al la nuna ŝtato de aferoj ol la ideo, ke la juda ekziliĝo de 70 pK ne okazis. Politika Cionismo, sur kiu baziĝas la nuna ŝtato de Israelo, kolapsus se la ideo de la juda ekziliĝo estus forigita. Tamen ĝuste tion diras israele naskita filmfaranto Ilan Ziv en sia nova dokumentada filmo 'Exile – A Myth Unearthed' [Ekzilo – Mito Elfosita], kiu estis elsendota de BBC, sed kiu fine estis retirita (<http://ilanziv.com/2013/04/28/the-exiling-of-my-film-exile-a-myth-unearthed-in-the-bbc-2/>). The Daily Mail iom detale raportis pri tio, sub titolo "BBC kritikita pro nuligo de filmo kun 'severaj implico', kiu pridemandas la amasan eliro de la juda popolo post la falo de Jerusalemo en 70 pK" (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2316492/BBC-criticised-dropping-film-severe-ramifications-questioning-mass-exodus-Jewish-people-fall-Jerusalem-AD70.html>). Mi postlasis komenton, dirante: "Bone farita, Daily Mail, pro raportado pri tiu kaŝ-kaŝa temo. Ĉu nun ni estas iomete pli proksime al tio, ke Daily Mail raportos pri aliaj kaŝ-kaŝaj temoj, kiel kio vere okazis en 9-11, kaj kiel ankaŭ filmoj kiaj 'ZERO: An investigation into 9/11' [NULO: Priesploro de 9-11] estis subpremitaj en la brita televido?". Mia komento ne aperis.

Mi ja deziras, ke Daily Mail ĉesu vidi ĉion en la politiko kiel maldekstron kontraŭ la dekstro. Tiu estas surfaca politiko, kaj tre surfaca ĝi ja estas. Tio malmulte rilatas al la realo. Kampanjo kontraŭ la sekreta ŝtato ne povas esti elektema. Se Daily Mail deziras malkaŝecon, ĝi devas malŝlosi ĉiujn ŝrankojn, sendepende de kies skeleto povus esti interne kaŝita. Ili produktis hektarojn da gazetpresado pri la mensogo de Tony Blair pri amasdetruaj armiloj en Irako, per kiu li iniciatis la Irakan Militon. Tamen Tony Blair mensogis al la brita parlamento ankaŭ post 9-11, dirante, ke li deponos en la biblioteko de la malsupra ĉambro de la parlamento pruvon, ke respondecis Osama bin Laden. Ne ne faris. Li mensogis. Tamen Daily Mail misfamigas tiujn kiuj malkredas Bush kaj Blair pri 9-11 anstataŭ malkaŝi la mensogojn.

Venu, Daily Mail, faru! Vi eble devos alfronti ribelon de via Melanie Phillips, sed faru. Vi gajnos iom da respekto kaj kelkajn novajn legantojn. Anstataŭe, Melanie Phillips la 8an de majo skribis longe kontraŭ la multkulturismon, kulpigante islamanojn pri 9-11 kaj 7-7, dirante ke aliaj estas en stato de psikologia malakcepto (<http://dailymail.co.uk/news/article-2320940>). Ne, ŝi estas.

\* Margaret Thatcher: Ĉu tirano aŭ uzato?

Sekve de la morto de Margaret Thatcher la 8an de aprilo, amase la nacia gazetaro en Britio estis kovrita de la raportado (<http://www.guardian.co.uk/politics/gallery/2013/apr/09/margaret-thatcher-death-newspaper-front-pages#/?picture=406864740&index=17>). The Daily Mail kovris sian antaŭan paĝon per la rakonto en kvar sinsekvaj tagoj (<http://www.thepaperboy.com/uk/daily-mail/front-pages-today.cfm?ArchiveStartRow=13>). Ŝia funebro estis levita al ŝtata evento. Tamen antaŭa Laborpartia ĉefministro Harold Wilson ricevis nur simplan ceremonion en la Insuloj Scilly (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-1034634/Lady-Thatcher-honoured-State-funeral.html>), eĉ kvankam li faris pli bonan laboron en tenado de Britio ekstere de militoj (<http://barneteye.blogspot.co.uk/2013/04/where-was-state-funeral-for-harold.html>), kaj ŝajne kontraŭis la Novan Mondan Ordon antaŭenigatan de CIA. Kial?

Ŝajnas al mi, ke la Establaĵo faris grandegan furoron pri ŝia morto ĉar estis en ties intereso tion fari. La nunan ekonomian krizon oni inĝenieris por firmigi la potencon, kaj tio celis ne nur transprenon de bankoj, sed ankaŭ la transigon de bonhavo de la popolo al la potenc-elito. Mi ne opinias, ke tio estis la intenco de Margaret Thatcher, sed por tio ili ŝin uzis. Nun, en morto, ili denove uzas ŝin samcele.

Richard Cottrell, eksa Konservativ-partia Eŭropa Parlamentanto, verkis denuncegan raporton pri la ĉefministreco de Thatcher, titolitan 'La vera heredaĵo de Thatcher: la nacisocialisma ŝtato de ŝia Moŝto' (<http://endthelie.com/2013/04/09/thatchers-true-legacy-her-majestys-national-socialist-state/#axzz2Q2HfrgOJ>). "Thatcher estis la kulmino de la konstanta transformiĝo de la brita politika personeco al nacisocialisma ŝtato ... La natura florado de la brita nacisocialismo estas neniu alia ol Tony Blair", li skribis. Pri siaj personaj renkontiĝoj kun ŝi, li skribis: "Ni, bandeto de fratoj en la Eŭropa Parlamento, estis apartigitaj por specialaj elmontroj de admonaj riproĉoj – kaj plu". Tion mi trovis interesa en la lumo de la ardaĵaj tribuoj laŭdaj tributoj fare de la nunaj EU-gvidantoj, inkluzive de unu de Martin Callanan, gvidanto de la konservativa grupo ECR, kiu inkluzivas la britajn konservativajn Eŭropajn Parlamentanojn, kiu diris, ke Thatcher postlasis "eksterordinaran heredaĵon" kaj, kune kun usona Prezidento Reagan, "helpis transformi la politikan mapon de Eŭropo" (<http://euobserver.com/news/119736>). Tio ilustras la hipokritecon en la nuna elverŝado de kordoloro.

Tamen ĉu Nacia Socialismo estis ŝia intenco? Malgraŭ tio, ke ŝi enoficigis memkonfesintan nazion, Alan Clark, kiel ministron, mi fine venis al la vidpunkto, ke ŝi verŝajne sincere kredis en la monetarismo (Kvanta Teorio de Mono) de Milton Friedman, kaj la demokratiigo de la lando per transigo de la rego for de la ŝtato en la manojn de individuoj, kaj ke ŝi estis unucela kaj senkompata en la antaŭenigo de tiu ideo. La problemo pri tio kompreneble estas, ke oni bezonas por tio pli da reguligo, ne malpli da reguligo, se oni volas eviti, ke la tuta afero fariĝu ludo de Monopolo, en kiu la venkanto prenas ĉion.

Ĝuste tio okazas, kaj la finludo estas korporacia transpreno. Dum Margaret Thatcher estis politikisto kun konvinkoj, Tony Blair havis neniujn konvinkojn ['convictions']; li devus havi konviktojn ['convictions'] kaj devus esti por longa tempo forŝlosita pro ili.

Estas rakonto, ke en unu vizito al la Konservativa Esplor-Centro, ŝi aperigis libron de Friedrich Hayek titolitan 'The Constitution of Liberty' [La Konstituo de Libero], batjetis ĝin sur la tablon kaj deklaris "Tion ni kredas". (<http://www.margaretthatcher.org/archive/Hayek.asp>). La problemo estis, ke Hayek aldonis apendaĵon, klarigante "Kial mi ne estas Konservativulo". Margaret Thatcher sin dediĉis al la ŝanĝado de la filozofio de la Konservativa Partio, surbaze de antaŭa libro de Hayek, 'La vojo al servuteco', ironie dediĉita "al socialistoj de ĉiuj partioj". Tamen eĉ Hayek opiniis, ke la registaro havas rolon por ludi en la ekonomio pere de reguligo ([https://en.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Hayek](https://en.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Hayek)).

En 1947 Hayek estis kunfondinto kaj la unua prezidanto de la Societo 'Mont Pelerin', kiu estis en 1984 (la jaro) priskribita kiel "sekretema grupo de ekonomiistoj, kiu kunvenas ĉiujn du jarojn, sed elmetas neniujn konkludojn aŭ rekomendojn"

(<http://modernhistoryproject.org/mhp?Article=WorldOrder&C=7.4>). En 1970 la prezidanteco transiris al Milton Friedman, kiu antaŭenigis siajn proprajn ideojn de Monetarismo, kiujn ne subtenis Hayek. Cetere li maltrankviliĝis pri tio, ke la Societo Mont Pelerin povus skismi en Friedman-anan kaj Hayek-anan branĉojn. Ĝuste la monetarismon realigis Margaret Thatcher, kvankam ankaŭ Milton Friedman fariĝis kritikanto de la monetarisma reĝimo kiun establis Margaret Thatcher.

Israele naskita Gilad Atzmon priskribis la rilaton inter Friedman kaj Thatcher, kaj ankaŭ kiel la valoroj de Friedman estis influitaj de lia forta Cionismo (<http://www.gilad.co.uk/writings/gilad-atzmon-milton-friedmans-capitalism-and-the-jews-revisi.html>). "Friedman argumentas, ke la libera merkato kaj konkursado estas bona por la judoj. Tamen li ankaŭ ĝisoste insistas, ke registara interveno estas katastrofo, kiu kondukas al antisemitismo kaj aliaj formoj de institucia bigoteco", skribis Atzmon. Li sugestas, ke Friedman mem verŝajne ne konstatis la plenan signifon de sia ekonomia modelo, kiu fine surgenuigos la Okcidenton, kun bezono de amasskala registara interveno. Spektante la videon de la intervjuo kun Friedman enkorporaciita en la retpaĝo de Atzmon, mi ne certas; li eble jes aŭ eble ne laboradis por la interesoj de la israela ŝtato kaj financa elito. Certe ŝajnas nun, ke la Societo Mont Pelerin estas, same kiel por aliaj societoj, transprenita de investitaj interesoj; en demisia deklaro de la Societo Mont Pelerin, Paul Craig Roberts skribis en 2008: "Mi ne volas esti ligita kun organizaĵo kiu estas fronto por usona hegemonio kaj militoj bazitaj sur propagando, mensogoj kaj trompado. Se ankoraŭ vivus Milton Friedman kaj F. A. Hayek, mi certas, ke ili kuniĝus kun mi en demisio" (<http://www.lewrockwell.com/roberts/roberts257.html>). Li estas kunaŭtoro de la libro 'The Tyranny of Good Intentions: How Prosecutors and Law Enforcement Are Trampling the Constitution in the Name of Justice' [La tiraneco de bonaj intencoj: Kiel prokuroroj kaj leĝ-obeigaj instancoj surtretas la konstitucion en la nomo de justeco] (<http://www.paulcraigroberts.org/pages/books/the-tyranny-of-good-intentions-how-prosecutors-and-law-enforcement-are-trampling-the-constitution-in-the-name-of-justice/>). Milton Friedman komentis en la unua eldono de la libro, eldonita en 2000, "runigia kulpigo de nia nuna sistemo de justeco".

Tony Gosling, pri 'Margaret Thatcher, kaj la viro en la ombroj', skribis: "La tabuo, kiun eĉ ne unu komentariisto trapenetris, estas la ombreca 'konsila' rolo ludata tra la tuto de ŝia ĉefministreco fare de la Labor-partia nobelo de la bankista frataro, Lordo Victor Rothschild. Estis malkaŝite en la libro kiun provis subpremi la Thatcher-registaro, Spycatcher [Spionkaptisto], de Peter Wright, ke li estis malantaŭ la plej altnivelaj sekretaj enoficigoj en Londono" (<http://rt.com/op-edge/margaret-thatcher-man-shadows-929/>). Cetere, en la sama libro, mi trovas, ke Victor Rothschild estis kerna persono ene de MI5, kaj "verkis serion da elegantaj memorandoj ... defendante la rajton de la sekurec-servo, provizi spion informojn petitajn de ĝi fare de la ĉefministra oficejo. La reago de Edward Heath estis, "Vi ne devus vin indulgi en la politiko; estas meĥanismoj por tiaspeca materialo". Do ŝajnas, ke lia posteulo, Margaret Thatcher, havis sian propran viron en MI5, sed ĉu ŝi uzadis lin, aŭ ĉu li uzadis ŝin, estas malferma demando.

"Kiam ŝi rifuzis aliĝi al la EMU, la antaŭulo de la malvirta Eŭro, ŝi estis tuj pornardita en la dorso fare de tiuj kiuj hodiaŭ kantas je ŝia gloro", skribis Tony Gosling. Kion mi trovas enigma estas, kial ili devis fari tian furoron pri la afero. Teorie la kabineto povintus iam ajn supervenki ŝin per voĉdonado. Ĉu ili estis senspinuloj, aŭ ĉu ili estis ĉiuj finance subvenciataj de la sama financa dinastio, kaj tiel ne saltante ĝis iliaj ŝnuroj estis tiritaj? Kompreni la tuton de tio – je ĉiuj niveloj, de la kabineto malsupren ĝis etaj membraraj asocioj – devas estis la ŝlosilo al la kompreno ĝuste kiel funkcias tiraneco, kaj kiel oni povus ĝin kontraŭi.

La heredaĵon de Thatcher daŭrigis Tony Blair, sed ĝi ne komenciĝis per Thatcher. Cecil Rhodes starigis sekretan societeton en 1891, kune kun William T Stead kaj fidato de Reĝino Victoria, kun la tiutempa Lordo Rothschild en la ombroj. Ĝia celo estis etendigi la Britan Imperion pere de financa manipulado, ĉion farante en la nomo de la "English speaking idea" [La anglaparola ideo]. Kiam Stead konstatis la verajn intencojn de Rhodes, li kontraŭstaris, kaj estis marĝenigita, kaj poste kuniĝis kun alia mecenato, Andrew Carnegie, kaj faris grandiozajn aferojn, kiel konstruigi la Pac-Palacon en Hago, kaj starigi la Internacian Kortumon de Justeco. Sed daŭris la militoj, kaj la nuna financa krizo estas nur la plej lasta en serio da manipolitaj kolapsoj. Malfeliĉe, la Internacia Kortumo de Justeco estas nun en la manoj de la Brit-Usona Establaĵo; ĝi neniam ekzemple procesos kontraŭ Tony Blair. Pri tiu 'anglapparola ideo' mi prelegos en julio en la feri-seminaria Alternativa Semajno ĉe Kastelo Gresillon en la Loire-regiono de Francio (<http://gresillon.org/spip.php?rubrique31>).

\* Enfiltrantoj: Kio estas en la afero por ili?

Agentoj de MI5, agentoj de MI6, kaŝaj agentoj de la politika polico, kaj privataj agentoj kiuj laboras ilianome devus ĉiuj kompreni, ke se venos malkaŝa tiraneco ili mem ne estos imunaj. Se ili estas efikaj ili povus esti vidataj kiel rivaloj. Se ili estas malefikaj ili eble estos malzorgitaj. Se ili daŭrigas, ili estos vendintaj siajn animojn al la diablo kaj perdintaj siajn proprajn personecojn; cetere ili eble jam faris. Kio motivigas tiujn homojn?

En 2005 mi provis ellabori kiuj aliaj membraraj asocioj povus esti infiltritaj de tiaj agentoj. Nun mi provas ellabori kiuj membraraj asocioj ne estas. Certe mi opinias, ke iu ajn kampanjanta asocio en Britio



plejverŝajne estas enfiltrita. La veromovado 9-11 en Londono suferis du grandajn epizodojn de misteraj malkonsentoj de post kiam mi aliĝis en decembro 2006, kaj ĝuste nun trairas pluan. La unuan kirlis falsaj akuzoj de antisemitismo kontraŭ Tony Gosling. Inter tiuj kiuj faris tiun akuzon estis la nuna vic-estro de 'Reinvestigate 9/11', Ian Neal. Mi do surpriziĝas vidi, ke Tony Gosling metas piedtekston de siaj retletero de UK-911-Truth, lige kun sia forumo, aprobe al 'Reinvestigate 9/11'. La dua batalsesio da misteraj malinterkonsentoj baziĝis sur falsaj akuzoj de 'holokaŭsto-neado' kontraŭ Nick Kollerstrom, sed kiam la gvidanto de 'Reinvestigate 9/11', Ian Henshall, faris tian implic-akuzon kontraŭ min (kaj implicite kontraŭ mian judan amikon, kun kiu mi laboris), kiam mi ne estis enplektita en tiu demando, estis klare, ke tio neniel rilatis al antisemitismo aŭ holokaŭsto-neado, kaj ĉiel rilatis al la subpremo de deca diskutado pri 7-7. Tiu estis la kialo, ke Nick kaj mi fine starigis la grupon Keep Talking.

\* Ne nepre estas tiel

La grupo 'Engineers & Architects for 9/11 Truth' [Inĝenieroj kaj Arkitektoj por 911-Vero] antaŭ nelonge lanĉis slogan-konkurson, cele al la lanĉo de reklam-kampanjo en septembro. Ili invitis al homoj almeti ne nur sloganon, sed ankaŭ grafikajn ideojn por afiŝo. Mi trarigardis la kandidatojn jam almetitajn, kaj gajnis impreson, ke ili plejverŝajne impresus aktivistojn en la veromovado pli ol la ĝenerala publiko. Tion mi perceptas kiel ĝeneralan problemon en iu ajn kampanjanta grupo kiam ajn oni petas al membroj propagandajn ideojn. Estas merkatada principo, ke se oni reklamas ion ordinaran, do oni prezentu ĝin kvazaŭ ekzotika, kaj se oni reklamas ion ekzotikan oni prezentu ĝin kiel ordinara. Io ajn kiu kontraŭiras la ortodokson, kiel 911-vero estas ekzotika. Kion ili ŝajne faras estas prezenti ion kiu jam estas ekzotika por ke ĝi aspektu eĉ pli ekzotika. Tion klarigis al mi gvidanta merkatada specialisto, post kiam li gvidis trejnan seminarion kiu uzas Esperanton kiel la ideon merkatendan. La kurso-partoprenantoj tro entiriĝis en la koncepton. Mi scias pri tio, ĉar mi konsiladis al la merkatada specialisto pri la Esperanto-movado, kaj fine mia filo estis dungita por respondi al demandoj pri Esperanto de la kurso-partoprenantoj. Eĉ la kurso-partoprenantoj enfalis la kaptilon, kaj tiuj estis la eŭropaj estroj de merkatado por Unilever!

Do mi ekis por koncepti ion kiu prezentus la aferon de 9-11 en maniero ordinara, kaj atingis la ideon "It ain't necessarily so" [Ne nepre estas tiel – konata pro kanto tiunome pri la biblio] kontraŭ fono de la ĝemelaj turoj kaj enmetita bildo de Osama bin Laden. Mi almetis ĝin rete, sed aperis nenio en la retejo. Post iom da tempo mi alskribis ilin por demandi kial, kaj mi ricevis respondon, ke ili priesploros. Ili petis al mi retroŝte sendi al ili mian afiŝon. Fine mi denove alskribis, por demandi kio okazis, kaj denove ili petis al mi sendi al ili retroŝte mian afiŝon. Denove mi sendis ĝin, kaj ankaŭ almetis mian afiŝon rete, kaj denove aperis nenio. Denove mi alskribis ilin, sugestante, ke se tio okazus en Britio mi suspektus sabotadon. Mi levis la aferon ke ili ŝajne uzas eksteran kontraktiton, Wizehive, por la almetoj, do mi skribis ankaŭ rekte al Wizehive. Wizehive respondis al la oficejo de 'A&E for 9/11 Truth', kopie al mi, dirante, ke la moderigo estis en la mandoj de 'A&E for 9/11 Truth'. Kaj tiam la sinjorino ĉe 'A&E for 9/11 Truth' konfesis, ke ŝi forigis mian afiŝon, donante feblan pretekston, ke ili decidis ne inkluzivi iujn ajn afiŝojn kiuj surhavas vizaĝon, sen diri al iu ajn. Mi sendis la korespondaĵon al la organizanto de 'A&E for 9/11 Truth', Richard Gage, kiu respondis, ke li faros sian eblon, kopie al la oficejo. La sinjorino ĉe la oficejo ankoraŭfoje petis kopion de la afiŝo. Mi povas nur inferenci la samajn konkludojn, kiujn povas atingi iu ajn leganto de tiu ĉi teksto. 'A&E for 9/11' faras bonegan laboron; tiel ni tenu aferojn.

Post tio mi aŭdis, ke mia municipa arto-centro, New Greenham Arts, kiu situas sur la tereno de la antaŭa usona nuklea bazo ĉe Greenham Common, organizis iujn aktivecojn surbaze de la temo 'Protesto en Arto', kaj invitis al homoj almeti siajn protesto-rakontojn. Do mi almetis pastiĉon surbaze de "It ain't necessarily so", aplikita al 9-11 (<http://www.cornexchangenew.com/news/article/protest-your-stories-ian-fantom>). Mi ricevis de ili afablan respondon, dirante, ke mia protesto-rakonto estas nun en ilia retejo. Ĝi ja estis, sed la ligo al individuaj protesto-rakontoj, kiu antaŭe aperis sur ilia ĉefpaĝo, malaperis. Demandinte pri tio, mi ricevis de ili instrukciojn kiel serĉi tiujn protesto-rakontojn. Tiu ne estis la afero. Finfine ili diris, ke ili tutsimple volis ordigi la paĝon. Estas interese, ke ili deziris tion fari tuj kiam iu menciis 9-11.

\* Kiu vere estas Tony Farrell?

Tony Farrell, kiu asertis, ke li estis maldungita de Sud-Jorkŝira Polico pro siaj kredoj pri 9-11 kaj 7-7, diris al kolegoj, ke li estas longe for de Londono, "atendante, ke la polvo kvietiĝu", kiel li diris al mi, sekve de ege polemika intervjuo en UK Column. Li diris al unu kolego, ke li timas pro sia vivo.

En elsendo de UK Column li intervjuis sinjorinon kiu nomas sin Charles Seven, kiu faris rimarkindajn asertojn pri ŝtata persekutado, dirante, ke la teroristaj atakoj de 7-7 ligiĝis al "7-7 estis en la vero amaskomunikila mafia rita satanisma sorĉistin-ĉasa venĝo por psikologie torturi, terorigi kaj paralizi min por ke mi ne alportu al la kortumo mian pruvajon malkaŝantan konspiron fraŭdi kaj murdi implikante vastan ŝakradon de trilionoj uzante ŝtelitan intelektan proprajon kaj aliajn ege fiajn aktivecojn ekde 2003 kaj plue". Tion mi raportis en mia februara-marta novaĵletero, kaj kiel Mark Windows konsterniĝis pro la ebleco, ke ĝi povus esti starigita kaptilo en kiu UK Column eble povus estas jure akuzita pro misfamigo.

Tiam Tony Farrell eldonis 239-paĝan raporton pri la afero Charles Seven (<http://www.thefarrellreport.net>). Diversaj membroj de la grupo Keep Talking ekesploris. Ili ne trovis ke aferoj kongruas. Mark Windows dokumentis la sangajn detalojn (<http://www.landofthefree.co.uk/site/component/content/article/1-latest-news/147-entrapment-or-insanity-where-fools-rush-in-and-the-qcharles-sevenq-story>)

La tagon post kiam mi estis informita de amiko, ke Tony Farrell foriris, mi ricevis retleteron de li, dirante: "Kial ne legi la raporton, la apendaĵojn, aŭskulti la sonbendojn kaj spekti 'Offensive – the story of Tony Farrell' [Ofensivo – la rakonto de Tony Farrell] UNUE antaŭ ol vi faras vian venontan probable-takson ke ni estas talpoj, kaj antaŭ ol vi komentis en/pri ['on' = 'en' aŭ 'pri'] KFM tiom negative? KONDAMNO SEN ENKETO . . . ". Mi estis mistifikita, do mi reskribis: "Kiu estas KFM? Al kiu dokumento vi aludas? Kie estas la kondamno? Post la helpo kaj simpatia aŭskultado kiun ni donis al vi, mi surpriziĝis pri via tono". Li direktis min al teksto mia, kiu trovis sian vojon al retejo de Kent Freedom Movement [Libero-Movado de Kent], en kiu mi asertis, "Ne tiom maltrankviligas min Charles Seven, kiom Tony Farrell", kaj ke Charles Seven ne impresis konvinke kiam ŝi parolis pri sia afero. Estis nenia kondamno, kaj neniaj probable-taksoj ke iu ajn estas talpoj. Tiel ekis la korespondado, kaj mi rekomendus al iu ajn kiu interesiĝas pri

normalaj teknikoj de evitado kaj kulpo-inversigo – aŭ "normaj teknikoj de enfiltrado", kiel envortigis unu persono – tion studi. Tion reproduktis Mark fine de sia raporto supre menciita.

Fine mi skribis: "Kiu ajn origine verkis la tekston de vi cititan, ŝajnas, ke vi kulpas pri ĝuste tio pri kiu vi akuzas min". Mi pridemandis la pruvojn, ke li fakte estas kiu li diras, ke li estas, kaj ke li estis maldungita pro la kialoj donitaj. "Kian pruvojn vi povas provizi, ke vi ne estis nur transigita al alia rolo?", mi demandis.

La 5an de julio 2011 Nick Kollerstrom kaj mi renkontiĝis kun Tony Farrell por la unua fojo. Ni jam invitis al li prelegi al la grupo Keep Talking, por rakonti pri sia maldungiĝo kiel Ĉefa Analizisto de Strategiaj Informoj de Sud-Jorkŝira Polico pro sia analizo de teroristaj riskoj en la regiono, sekve de personaj esploroj pri 9-11. Ni renkontiĝis antaŭ la kunveno kuntrinkante, kaj li ŝajnis tiutempe esti tre kredebla.

En tiu unua renkontiĝo du aferoj ne ŝajnis tute ĝustaj. Unu estis la linio de atako en lia apelacio al la labor-tribunalo surbaze de religia diskriminacio, kiam li diras al ni, ke li estis maldungita pro faro de sia laboro. La alia estis peto lia, ke ni en tiu ĉi stadio ne publike disinformu pri tio, kiam li estis ĵus faronta publikan prelegon ĉe nia grupo Keep Talking. Dumtempe kreskis miaj duboj pri liaj juraj konsilistoj, kaj tion mi diris al li. Poste li mem fariĝis enigma, dirante al ni, ke li havas informojn pri polica maskado rilate al [la amas-morto ĉe la futbalstadiono] Hillsborough, sen diri kio ĝi estas, ĝis ni povis mem legi pri tio en la gazetoj. Pli kaj pli li diradis al ni, ke li faros ion grandan, sen diri al ni kio, aŭ peti helpon. Kiam mi lastfoje renkontis lin, mi sugestis, ke eble plej bone li ne parolu pri tio kion li faros ĝis li jam faris, ĉar tiel li simple donas al la kontraŭuloj ŝancon interveni. Li estis malakceptema. Tamen li diradis al mi, ke li demisiis el la grupo, ĉar li ne kredis je "nura parolado". Neniu sugestis, ke ni kredas je "nura parolado", kaj fakte ni estis tre subtenemaj al li kaj aliaj. Li, kaj aliaj, nun tordas kion ni diras. Ankoraŭfoje tio aspektis kiel plua ekzemplo de kulpo-inversigo.

Kiam Tony Farrell diris al mi, ke mi devos legi la tuton de lia raporto, mi faris ĝuste tion, krom ke mi ĉesis kiam mi atingis paĝon kiu absolute havis tute nenian sencon al mi. Tiu estis paĝo kvar. Ĝi enhavis montaĝon de librovoro, iuj fotoj kaj ŝajnaj magazinartikoloj, kun nenia klarigo. Iuj opiniis, ke ĝi estas falsita magazinpaĝo, sed se ĝi estis, ĝi estis tiom malbone farita, ke tio eĉ ne trafis mian menson. Se tiu estis la kvalito de lia laboro ĉe Sud-Jorkŝira Polico, oni do ne miru, ke li estis maldungita.

Tiuj malkaŝoj grandioze ĉagrenis min, ĉar kiel eksa Ĉef-Analizisto pri Strategiaj Informoj kun Sud-Jorkŝira Polico, Tony Farrell estus valorega porparolanto de la veromovado 9-11. Anstataŭe, li evidentiĝis estis mem-publicisto ene de la veromovado, provante impresi nin pli ol la ĝeneralan publikon.

\* Nun regulaj kunvenoj por Keep Talking

Keep Talking nun retrovas siajn piedojn, kun nova kunvenejo ĉe komunuma arta centro norde de la stacidomo King's Cross. Enfiltrado ŝajnas esti grava rimedo uzata de la Establaĵo en la sabotado de iuj ajn grupoj kiuj havas proprajn ideojn. Kiam ajn grupoj suferas de insidaj atakoj de interne, la grupo ĉiam perdos iujn aktivistojn, kaj do la enfiltrintoj ĉiam venkas en la mallonga daŭro. La uragano en kiu kaptiĝis

Keep Talking en marto kaj aprilo estis trafa leciono por iuj, sed en tiu ĉi kazo, estas nun plifortigita sento de teamlaboro dum ni vidas pli klare tion kio nin konfrontas.

Ĉio devas esti malkaŝita, prefere ol ke ni permesu al la afero plue fumbri. Iu ajn en kampanjanta organizaĵo nepre estu konscia pri tio. Mi antaŭ nelonge ricevis kopion de retletero de membro de la Stop the War Coalition [Koalicio 'Ĉesigu la Militon'] al la gvidantaro, en kiu li faras serion da demandoj, asertante "Sekve de miaj frustrigoj kun STWC pro ignorado de miaj sinproponoj helpi ... mi ankaŭ ĉagreniĝis observante la manieron kiel kondukas sin STWC ... Rezulte de tio kaj de sennombraj aliaj pensofadenoj mi venis al la konkludo, kiun jam atingis multaj aliaj – ke STWC estas tiom enfiltrita de homoj dediĉitaj al la servo de tiuj kiuj strebas al la socia ordo de eterna militado, ke ĝi neniam povas esti rezultodona" (<https://groups.google.com/forum/?fromgroups=#!topic/uk-911-truth/A6BfnRmDoAY>).

En sia blogo pri la repreno de sia filmo pri la juda ekzilo, Ilan Ziv skribis: "Tuj kiam oni senpersonigas tiun ĉi incidenton, oni gajnas fascinan subkomprenon kiom subtila kaj kompleksa estas la procedo per kiu estas formata nia kompreno de la israel-palestina konflikto, kaj kio okazas kiam iu kuraĝas levi demandojn pri aferoj de iuj konsiderataj tabuoj. Ĝuste tiun subkomprenon laŭ mi valoras komunigi kaj detaligi". Prave, kaj tiel mi sentas pri 9-11, kaj kompreneble pri la regata malkonstruo de la Esperanto-movado en Britio.

Kiam oni abstraktas tion kio fakte okazas, ignorante personecojn, aferoj povas aperi tre malsamaj. La ŝlosilo al 911-vero, kiel mi vidas la aferon, kaj cetere por iu ajn kampanjada agado, estas, ke la aktivistoj faru ĝuste tion. Se homoj forkuras de tiuj situacioj, venkas la enfiltrintoj. La antidoto devas, kiel ĉiam, esti daŭrigi la paroladon.

Salutas Ian  
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)  
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵletoj: Ian Fantom)

Artikoloj

La normala lingvo

En eseo premiita en la Belartaj konkursoj de UEA, Toño del Barrio konsideras diversajn aspektojn de la esperanta lingvo kaj movadoj, kaj venas al la konkludo, ke Esperanto multmaniere estas pli normala ol ofte kredas la esperantistoj mem. "Certe ekzistas stranguloj, ja, kaj ankaŭ revuloj, probable eĉ en pli granda proporcio ol tiu trovata en la ĝenerala socio. Sed kiam ni konsideras tiun apartan kolektivon de

homoj kiuj engaĝiĝas en socia agado, kiuj formas organizitajn grupojn, kiuj interesiĝas pri aktiva kultura movado, kaj ne nur pri konsumado, tiam Esperantujo estas tre tipa", li skribas.



Venas kaj revenadas la taksoj pri Esperanto. Ĉu ĝi estas artefarita, ĉu ni ĝin konsideru "dua lingvo", eventuale por ĉiuj. Kaj kia ĝi estu: ĉu ĝi estu simpla, ĉu ni faru ĝin esprimiva. La demandoj pri Esperanto, pri kia ĝi estas, troveblas en ĉiuj niaj klopodoj por informi la t.n. eksteran publikon, sed ĝi estas unu el la plej konsiderataj ankaŭ ene de la esperantista movado, kiu ne laciĝas debati pri la ecoj de la lingvo mem. Mi deziras defendi tezon kiu povus aspekti tre simpla, eble banala, kaj kiu tamen, se ni konsideras la longecon de la diskutoj pri la lingvo, fariĝas preskaŭ revolucia: ke Esperanto estas, kaj ke ni ĝin tiel konsideru, kaj ni devas tiel ĝin prezenti publike, simple lingvo normala.

Mi unue konsideros tion ĉi rilate al specifa debato, kiu disvolviĝas interne de la komunumo de parolantoj, kaj do povas aspekti ne tre grava el objektiva vidpunkto, sed kiu tamen estas ofte diskutata, ĝis la punkto ke ĝi povas okupi longan spacon en publikaj forumoj, kaj ĝi estis la temo de specifaj libroj, broŝuroj kaj artikoloj: la uzado de neologismoj kaj la evoluo de la lingvo. Kaj poste mi dezirus pritrakti similajn konsiderojn pri nia ekstera bildo kaj pri la ecoj de nia movado aŭ kolektivo mem.

Unu el la plej furoraj libroj de la lastaj jaroj en la Esperanto-eldonado estis tiu de Claude Piron, La bona lingvo. Ĝi defendas verve, pasie kaj konvinke unu specifan manieron uzi nian lingvon: ĝi estu klara, kun maksimuma ekspluato de la bazaj ecoj de la klasika lingvo, la fundamentaj radikoj, kaj la kombinoj de la prefiksoj kaj sufiksoj, por krei ĉiujn necesajn nuancojn de la skriba kaj la parola lingvaĵo. Probable, ĝia sukceso montras la emon de granda fluo de la parolantoj, kiuj petas simplecon, kaj ne ŝatas la daŭran uzon de vortaroj kaj glosaroj al kiu ilin devigas kelkaj niaj aŭtoroj.

La plej brilan rebaton al la libro de Piron donis Jorge Camacho, en sia artikolo "La mava lingvo", aperinta en la kolektiva libro Lingva arto. Jam en la titolo Camacho montras la lingvouzon kiun li sentas sin devigita defendi kontraŭ la tezo de Piron: ni uzu ĉiujn vortojn kiujn la jam longa historio de Esperanto donis al ni, kaj specife tiujn kies jam delonga apero igas sence ke oni nomu ilin neologismoj. Ni eĉ ne timu krei novajn terminojn, kiam ni konsideras ke la nun ekzistantaj ne plenumas la postulojn de esprimriĉeco kiun nia lingvo bezonas.

La du tekstoj, tiu de Piron kaj tiu de Camacho, estas brilaj, altnivelaj, konvinkaj, kaj mi nur bedaŭras ke mi tro multe simpligis ilin. Ili estas la plej altaj pintoj de argumentado de polemiko kiu re kaj re venas. Nur por doni ne foran ekzemplon, mi nun memoras la malferman sesion de la Akademio en la lasta



Universala Kongreso de Florenco, en kiu la plej polemika afero montriĝis ĝuste la demando pri la uzo de la neologismoj. Ke la debato oponigis du akademianojn kiuj samtempe okupas la postenojn respektive de prezidanto kaj vicprezidanto de UEA, igis la spektaklon des pli amuza.

La argumentoj de ambaŭ partioj, de Piron kaj de Camacho, de Corsetti kaj Tonkin, estas naturaj kaj logikaj, kaj ili bone respondas al demando: kiun lingvon oni uzu. Mi deziras argumenti ke ĉiuj kvar pravas, eĉ se ili defendas ŝajne kontraŭdirajn tezojn. Ni uzu kaj la bonan lingvon kaj la mavan.

La motivo defendi ambaŭ respondojn ne estas ŝajne troa modereco aŭ ĉi trovi mezan punkton en la argumentadoj, sed mia konvinko ke la problemo kuŝas ne en tio ke la respondoj bonas, sed ke malbonas la demando. Tiu ĉi ne devus teksti: kiun lingvon ni uzu? La ĝusta demando jenas: kiam ni uzu la malsamajn stilojn de nia lingvo? La debato ne estu: ĉu ni diru “malsupreniri” aŭ “descendi”?, sed: kiam ni uzu ĉiun el ambaŭ vortoj?

Ĉiuj lingvoj havas diversajn registrojn, tiel ke homo ne parolas same al la panjo, al bebo, al sia ĉefo, al instruisto, en la televido, kaj ĉiu parola stilo malsamas al skribado de intima letero, de burokrata peto aŭ de beletra eseo. Edukado en denaska lingvo devus lernigi la studantojn pri la neceso koni la diversajn stilojn, kaj kapabli uzi ĉiujn en la adekvataj momentoj. Ankaŭ en mia lingvo, la hispana, ekzistas du vortoj por la agado iri en malsupran lokon: “bajar” kaj “descender”. Mi ne memoras iam esti uzinta la vorton “descender” kiam mi parolas kun miaj gepatroj, sed mi tre ofte kaj nature uzas ĝin en iom pli formalaj cirkonstancoj aŭ por pli abstraktaj nuancoj.

Tiaj paroj de vortoj, unu pli ĉiutaga kaj alia pli formala, la unua ĝenerale devenanta de la praa historio de la lingvo kaj la alia enkondukata de la kleruloj en pli malfruaj stadioj, tre abundas en la hispana, kaj, kiom mi scias, ankaŭ en aliaj lingvoj. Kelkaj el la novaĵoj trovis oponon, kaj en la hispana literaturo estas tre konata la polemiko inter du gravaj aŭtoroj de ties t.n. Ora Epoko, Francisco de Quevedo kaj Luis de Góngora, pri la, laŭ la unua, troa uzo de neologismoj fare de tiu ĉi lasta. Estas fama en Hispanio la poemo de Quevedo en kiu li moka uzas neologismajn vortojn, por ataki sian rivalon. La plej amuza estas ke la plimulto de la uzataj vortoj, tiam novaj kaj ekstravagancaj, fariĝis tute kutimaj nun, sed aliflanke ili estas ĉefe uzataj en kleraj kuntekstoj. Krome, la novaj vortoj ĝenerale akiris specialan signifon, ofte pli abstraktan, tiel ke ne estas sama “redondo” kiel “rotundo”, “estrecho” kiel “estricto”.

Pardonu ke mi uzis ekzemplon de mia propra lingvo, sed mi deziris lumigi tiun jam deklaritan tezon: Esperanto estu, ankaŭ tiuaspekte, normala lingvo.

Ni uzu ĉiujn vortojn, sed ni zorgu kiam ni elektas kiun el ili. Certe, ne signifas la samon “mallarĝa” kiel “strikta” aŭ “streta”: la unua neniam malaperos en Esperanto, la dua jam sufiĉe enradiĝis, sed ĝi prenis kaj firmigis alian signifon, dum la lasta trovos alian nuancon, tiel ke ĝi ne plu estos la anstataŭanto de la unua.

Lasta ekzemplo por montri kion mi celas. Mi, kaj ne nur mi, taksas malbona uzado de Esperanto la komencon de la traduko, fare de Fernando de Diego, de “La familio de Pascual Duarte”, de Camilo José Cela: «Mi, sinjoro, ne mavas, kvankam ne mankis al mi motivoj por mavadi». Sed ne ĉar mi principe kontraŭas la uzon de “mava”, kiu certe trovos sian lokon en nia lingvo. Mia argumento estas ke Pascual Duarte estis margena kamparano, analfabeta. Se li parolus en Esperanto, li neniam uzus la vorton

“mavi”, kaj tial mi taksas tiun komencon grava stila miselekto. Ne temas pri bona aŭ mava lingvo, sed pri mava uzo de bona lingvo.

Rilata al la demando pri neologismoj troviĝas la ankoraŭ pli diskutata temo de la evoluo kaj la reformado de la lingvo.

Neniu dubas ke lingvo devas evolui, kaj probable ankaŭ la plimulto konsentas ke ne eblas radikalaj reformoj, sed la grado de ŝanĝebleco de nia lingvo estas denove objekto de polemiko. Mia vidpunkto sekvas denove la regulon jam antaŭanoncitan: Esperanto ŝanĝiĝu tute kiel alia normala lingvo.

Mi ne tuŝos nun la ĝeneralan evoluon ŝulditan al la paso de la tempo kaj al la bezono uzi novajn vortojn aŭ esprimojn por novaj realaĵoj. Pri tio apenaŭ ekzistas malkonsento, krom en la detaloj. Mi parolas pri pli drastaj aferoj, en kiuj enmiksiĝas la danĝero pri reformoj.

En tiu ĉi kazo ekzistas denove du ekstremaj sintenoj, kiujn mi simpligu: parto de la parolantaro defendas la plej klasikan uzon, kaj oponas aŭ almenaŭ malfidas la enkondukon de modifoj, inklude de sufiksoj aŭ vortuzoj kiuj malproksimiĝas de la pure zamenhofa modelo. Aliaj dezirus solvi la supozatajn mankojn de la nuna uzo, kaj pretus akcepti deviojn disde la Fundamento. La unuaj timas la disrompiĝon de la unueco de la lingvo. La aliaj vidas la danĝeron de ŝtoniĝo.

Klasikaj disputoj fariĝis tiuj pri la nomoj de la landoj, la ĉapelitaj literoj, la seksismo de la lingvo, por citi la plej disvastigatajn kaj plej ofte revenantajn temojn.

Mi ne deziras trakti unuope tiujn diskutojn. Pri kelkaj el ili mi esprimiĝis diversloke, kaj pri la problemo de la seksismo mi publikigis specifan artikolon. Sed mi deziras doni konsilon al la homoj kiuj iam troviĝas en tia diskuto: sekvu la kriteriojn kiujn vi uzus rilate al via denaska lingvo, se tiu ne estas Esperanto mem.

Se vi konsideras vian lingvon seksisma, kaj vi pretas modifi vian lingvouzon por eviti la trajtojn igantajn ĝin tia, tiam ne hezitu agi same en Esperanto, kaj en la sama grado. Tio estas, se vi ne plu uzas “he” aŭ “él” por paroli pri homo, ne specifante la sekson, kaj do vi ekzemple uzas “they” aŭ “él o ella”, ankaŭ en Esperanto evitu la elekton de “li” por tiaj okazoj en kiuj inoj estas ankaŭ inkluzivataj. Se vi pretas uzi novan aŭ nekutiman pronomon, agu same en nia lingvo. Se tamen vi preferas pli klasikajn uzojn en via propra lingvo, aŭ se vi konsideras ke tiu afero ne sufiĉe gravas por modifi parolmanierojn jam malnovajn, ne uzu alian kriterion en Esperanto.

Se vi pretas modifi la ortografion aŭ la alfabeton de via lingvo, vi estas tutcerte rajtigita defendi la modifon de la esperanta ortografio. Se vi preferas respekti la multjaran tradicion de via lingvo, memoru ke jam Esperanto havas siajn proprajn historion kaj tradicion.

Tre ofte oni havas la impreson ke homoj ne konsideras Esperanton serioze kaj tro frivole emas ludi per ĝi. Aliflanke, la krizo de ido kaj aliaj reformemoj tiel vakcinis nian movadon ke eĉ la plej sendamaĝaj evoluoj estas rigardataj kiel danĝeraj herezoj. Sed Esperanto estas matura: ni traktu ĝin kiel normalan lingvon.

Eble se ni komencas konsideri la lingvon normala en siaj ecoj, ni ankaŭ prezentos ĝin tia al la publiko.

Neesperantistoj emas konsideri nian lingvon nenormala: ĝi konsistigas senvivan kodon, sen historio kaj literaturo. Okazas ofte ke ni devas dekomence atentigi ke tio ĉi ne veras, kaj ke tiurilate Esperanto estas plene normala, kaj nur en kelkaj trajtoj ĝi povas malsami, ĉefe pro la plia juneco de la lingvo mem aŭ pro la relative malalta nombro de uzantoj.

Sed ne pri tio mi deziras insisti, ĉar mi supozas ke ĉiuj kiuj iam engaĝiĝis en ekstera informado aŭ kiuj devis respondi al la demandoj de siaj konatoj pri Esperanto jam pli-malpli uzis tiujn argumentojn.

Mi preferas trakti pri nia rilato kun la lingvo, fronte al la publiko mem. Kaj por tio, anstataŭ paroli pri ĝeneralajĵoj, mi preferas uzi konkretan anekdoton: Antaŭ dekelkaj jaroj, iu leganto de la revuo Esperanto skribis ke li hezitis ĉu enmeti sian konon de Esperanto en sian laborprotokolon, inter siaj aliaj hobiaĵoj. Li timis ke tio povus aspekti kiel ŝatokupo de strangulo kaj ke ĝi povas damaĝi liajn ŝancojn en la serĉado de laboro. Mi memoras ke mi miris leginte pri tiuj skrupuloj; mi ne havis dubojn pri tio: Esperanto troviĝis en mia laborprotokolo, en la fako lingvokonoj, kune kun la ceteraj lingvoj kiujn mi, eble iom troige, asertis koni. Miaj dungantoj ne montris surprizon pri tio, kaj neniam mi trovis forpuŝon aŭ ajnan negativan sintenon.

Estus bone ke la normalaj esperantistoj (ni ĉiuj, ĉu ne?) faru pedagogion, kaj konvinku nin mem kaj la ceterajn ke ankaŭ nia lingvo estas normala.

Mi konscias ke tiu ĉi estas la aspekto plej malfacile defendebla el la aliroj pritraktataj en tiu ĉi eseo. Koncerne Esperanton, malsamas la kialoj lerni la lingvon, la procezo ĝin akiri kaj ensorbi, kaj la rilato kun aliaj parolantoj. Sed en tiu ĉi kazo, la komparo devas fariĝi ne kun la maturaj pli establitaj literaturaj lingvoj. Stompiĝas la diferencoj kiam ni komparas la rilaton kiun havas parolantoj de historiaj dialektoj kun ties norma lingvo, kiam tiu ĉi estas sufiĉe juna aŭ evidente apartiĝas disde la konkreta parolvarianto.

Kaj tiuj diferencoj definitive malgraviĝas kiam la komparo fariĝas kun la lingvoj kiujn oni lernas kiel fremdajn. Tiam, oni povas ja diri ke, sendube, Esperanto estas normala dua lingvo.

Tio ĉi kondukas min al la pritrakto de la parolantaro de Esperanto, tio kion ni povus nomi movado, komunumo aŭ ĝenerala lingvanaro. Ĉiujn samajn konsiderojn kiujn mi ĝis nun traktis rilate al la lingvo, ni povas fari pri la movado mem. Ĝi estas normala anaro.

Tiu aserto povas esti siavice konsiderata kiel normala en si mem, kaj do iuj probable miros ke mi elmetas tiun ĉi evidentaĵon. Sed mi tiel ofte trovis misjuĝojn pri nia movado, ĉu pro trotaksado, ĉu pro minuskomplekso, fare de la parolantoj mem, ke mi ne povas rezisti iom konsideri tiun ĉi aspekton.

Mi supozas ke ĉiu komprenas kion mi aludas kiam mi parolas pri memtrotaksado: la supozata rolo de Esperanto kiel solvilo de ĉiuj konfliktoj estas jam sufiĉe diskreditigita, por ke mi insistu pri ĝi. Ankaŭ la antaŭsupozoj pri la speciala karaktero de la esperantistoj, kiuj estus ĉiuj pacaj idealistoj, pretaj je memofero kaj tutkore inklinaj al la internacia amikeco, estas bildo ankoraŭ ofte ekzistanta inter la simpatiantoj aŭ la novuloj, kiun eĉ mallongtempa partopreno en esperantistaj aktivadoj baldaŭ forviŝas. Esperantujo logas ĉiaspecajn homojn, kaj mi nur emfazu ke estas bone pri tio averti la novulojn, por ke ili ne ricevu elrevigajn surprizojn kiuj povus ilin forpuŝi post malmulte da tempo.

Tamen ne pri tiu mistakso mi deziras insisti, ĉar tion jam kritikis aliaj antaŭe, sed ĝuste pri la malo. Eble la kritikoj akiris pendolan movon, sed mi trovas pli ofte la mistaksadon en la alia direkto. Laŭ mia opinio, de iom da tempo, Esperanton hantas la minuskomplekso kaj la masoĥismo.

Svarmas la kritikoj kaj la moko al la supozata strangecco de la esperantistoj, eĉ, kio estas des pli surpriza, fare de la esperantistoj mem. Laŭ tiuj supozoj, ni estus sekto de neadaptitoj kaj sociaj margenuloj, revantaj renversi la mondon per la svingado de flagoj kaj la elmontrado de verdaj steloj. Nu, eble mi iom troigis, sed la direkton de la epitetoj vi certe rekonis.

Mi suspektas ke tiu memmistraktado jam ekzistis en malnovaj tempoj, sed mi kredas ke ĝi intensiĝis en la lastaj jaroj, ĉefe danke al la sukceso de la libro Esperanto sen mitoj de Ziko Sikosek. Tiu pro diversaj kialoj dankinda verko havis la flankan efikon ke ĝi tro forte puŝis la konsciencon pri la mankoj de nia komunumo en ekstrema direkto, tiel ke oni nun devas senmitigi ĉion rilatan al Esperantujo se oni deziras agi laŭmode, kvazaŭ ĉiuj niaj agadoj kaj streboj estas senkondiĉe kondamnitaj al fuŝado.

Kaj tamen mi pensas ke ni, la esperantistoj, estas tre normalaj.

Eble mi nun devas precizigi: normalaj rilate al kio? Normalaj en komparo kun ĉiu alia grupo de homoj kiuj interesiĝas pri specifa socia aŭ kultura agado.

Certe ekzistas stranguloj, ja, kaj ankaŭ revuloj, probable eĉ en pli granda proporcio ol tiu trovata en la ĝenerala socio (kvankam lastatempe eĉ tion mi dubas kiam mi spektas la programojn furorantajn en la monda televido, kiuj supozate bildigas la realon kaj eĉ nomiĝas realecaj). Sed kiam ni konsideras tiun apartan kolektivon de homoj kiuj engaĝiĝas en socia agado, kiuj formas organizitajn grupojn, kiuj interesiĝas pri aktiva kultura movado, kaj ne nur pri konsumado, tiam Esperantujo estas tre tipa.

Eĉ la citita "Esperanto sen mitoj" tion agnoskas: "Ankaŭ aliaj movadoj aŭ grupoj havas sektajn trajtojn aŭ principe estas leĝeraj rilate al la vero. Sed la konstato, ke misagoj ekzistas aliloke, ankoraŭ ne ŝanĝas la situacion al bono, sed facile servas eĉ al sinpravigo" (paĝo 46 de la eldono de 2003). Certe kaj trafe, kaj mi ne deziras pravigi la fuŝojn kaj silentigi la kritikojn, sed mi ŝatus ke kiam ni renkontas erarojn kaj ekscesojn, la komento ne plu estu la senkuraĝiga "Ba, tipa fuŝo de esperantistoj", sed atako al la konkreta mispaŝo.

Mi havis la okazon dum mia vivo aliĝi al politika partio, al studenta asocio, al diversaj kulturaj grupoj, al profesiaj organizaĵoj, mi sufiĉe konas religiajn kolektivojn aŭ naciistajn grupojn, mi partoprenas diverstipajn rondojn. Kaj mi tie vidis la samajn trajtojn pri kiuj ni emas kulpigi la esperantan movadon.

Oni povus rakonti multajn spertojn kaj anekdotojn, sed mi uzu nur unu ekzemplon: iam mi relegis grandan parton de "Esperanto sen mitoj" komparante la tie aperantan diagnozon al la majoritata politika partio de mia lando, do al tute tipa, tre grava kaj influa kolektivo, kaj mi trovis multajn paralelaĵojn. Ankaŭ en tiu kazo temas pri movado kiu deziras ŝanĝi la socion, kies bazaj principoj tamen devas adaptiĝi al pli realismaj postuloj, kies intermembraj rilatoj foje havas sektecajn trajtojn, kies bazaj aktivuloj estas ĉu tre junaj ĉu maljunaj, dum la gvidantoj troviĝas pleje en la mezaĝo.

Ankaŭ ili svingas flagojn en siaj komunaj agadoj, foje kantas himnojn, beligas sian historion, troigas la nombron de siaj anoj, kaj estas “leĝeraj rilate al la vero” kiam ili parolas pri si mem. Eĉ la adoron al la fondinto aŭ iniciatoro de la partio (kiun ili nomas “la Avo” aŭ eĉ “la Majstro”) ni trovas!

Mi konsentas do kun Sikosek ke tiu konstato ne ŝanĝas la situacion al bono, kaj ne devas servi al sinpravigo, sed almenaŭ ne devus konduki al malespero nek al masoĥismo.

Ĉar masoĥismo estas kion ni trovas kiam ĉe la kritikoj al esperanta Vikipedio oni atribuas al nia lingvo mankojn trovatajn en ĉiuj mezgrandaj versioj, aŭ eĉ proprajn al la koncepto Vikipedio mem. Aŭ kiam fermiĝas esperanta firmao kaj oni eltiras konkludojn pri la lingvo, dum en la cetera mondo entreprenoj kreiĝas kaj mortas ĉiutage.

Kaj definite masoĥisma estas nia uzo de la vorto “kabei”. En ĉiuj movadoj estas tute normale ke homoj ilin forlasas, pro tre diversaj kaŭzoj: de senrevigo ĝis okupiteco, de kverelado kun aliaj anoj al ŝanĝiĝo de personaj cirkonstancoj. Sed nur ĉe ni oni uzas por tio la nomon de unu el la pioniroj plej prestiĝaj el la movado, tiel ke la tento forlasi ĝin havas kvazaŭ pozitivajn kromsignifojn. Kaj tamen la eblo senĝene kaj senbedaŭre ekserperantiĝi, ĉu tio ne estas la plej bona pruvo ke ni ne konsistigas sekton? Ni definitive estas normala movado.

Toño del Barrio

(Unue aperis en Beletra Almanako 1)

Tabakfumado inter lernejojunoj

Paiva Netto



José de Paiva Netto\*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

Laŭ ciferoj de Monda Organizo pri Sano (MSO), 90 procentoj el la fumantoj havis sian unuan kontakton kun tabako en lernejaj jaroj, tio estas, en la aĝo inter 5 kaj 19 jaroj. La programo “Diskutoj pri Edukado”, de Superreto Bona Volo de Radio, pritraktis tiun gravan temon kaj klopodis montri la grandegan



respondecon de edukistoj, same kiel de familioj, serĉe de rimedoj, kiuj evitas al alproksimiĝon al fumado, nome al enirpordo por pli pezaj drogaĉoj.

En intervjuo donita al pedagogiistino Suelí Periotto, d-rino Mônica Andreis, magistro pri klinikopsikologio ĉe Universitato de San-Paŭlo (USP), vicdirektoro de Organizo por Kontrolo de Tabakfumado (ACT), en Brazilo, elstarigis la gravecon de lernejoj en preventado de tiu toksomanio. “Ĝi estas la oportuna okazo, por ke la edukato lernu iom pli pri tabakfumado kaj tiel havu pli da konscio pri la graveco ne komenci fumadon. Lernejoj povas multe kontribui por tio, ne nur per montrado de sanproblemoj, sed krome, per diskutado pri tio, kial homoj fumas, pri la rolo de propagando, pri la damaĝo ne nur al sano, sed ankaŭ al la medio, kie oni vivas. Instruaj organizoj povas konsideri la temon laŭ diversaj vidpunktoj. Amasiĝo de cigaredstumpoj, ekzemple, estas io, kio plej multe malpurigas plaĝojn, ili mortigas marbestojn, ĉar ĉi tiuj glutsufokiĝas pro ili; multajn arbarojn fine oni detruas por produkti cigaredojn, ĉar oni uzas lignon, oni uzas paperon. Kaj tiaj informoj estas tre gravaj. Gelernantoj povas alporti tiujn sciojn hejmen kaj transdoni ilin al siaj gepatroj, al siaj familianoj, eĉ al anoj de siaj komunumoj. Lernejoj povas organizi sciencofoiron, kaj ĉi tiun temon oni povas diskuti; prezenti filmon, alvoki la familion por partopreno kaj poste diskuti. Eblas pluraj manieroj pristudi tiun temon, kaj edukistoj havas esence gravan rolon en preventado de tabakfumado”.

#### Leĝo kontraŭ tabakfumado

Laŭ d-rino Mônica, leĝo kontraŭ tabakfumado efektive helpas, ke infanoj ne interesiĝu pri cigaredo: “Nuntempe, tiu malpermeso estas malstimulo al tio, ke ĝi komencu fumadon, ĉar homoj jam ne fumas ĉie ajn, kiel en pasinta tempo. Ĉi tio, kune kun lerneja pritraktado pri tiu temo, en konstanta maniero, fine favoras, ke oni ne komencu fumadon en adoleskaĝo”.

#### La potenco de influado

Oni demandis d-rinon Mônica pri la emociaj aspektoj, kiuj povas influi infanon kaj junulon koncerne tabakfumadon, kaj ŝi klarigis: “Iuj faktoroj favoras, ke ili provu aŭ komencu fumadon. Oni scias, ke idoj de fumantaj gepatroj havas pli fortan inklinon fariĝi mem fumantoj estonte. Multaj infanoj ekfumas pro tiu modelo, kiun ili havas hejme, aŭ eĉ en lernejo, nome pro tiu instruisto, kiun ili admiras, kaj kiu tamen fumas. Jen kial necesas konsciiĝo flanke de familianoj kaj de instruistoj, koncerne la influon, kiun ili povas havi je la vivo de infano. Krome, dum adoleskaĝo, homoj trapasas sinsekvon da ŝanĝoj. Nature, aperas malsekureco, kaj foje cigaredo estas la kondukilo al tuja plezuro. Estas grave, ke infano perceptu, ke fumado ne alportos al ĝi subtenon aŭ garantion pri sukceso en la vivo. Cigaredo estas drogaĉo, kaj post ekprovo, infano facile povas fariĝi ĥemie dependa de ĝi. Sekve, se ĝi estas konscia, tiam ĝi sukcesas nature diri ‘ne’”.

#### Evitebla morto

En siaj finaj konsideroj, psikologino Mônica Andreis emfazis, ke “pasivan fumadon Monda Organizo pri Sano konsideras kiel la ĉefan kaŭzon de eviteblaj mortoj. Ĉi tio signifas tre grandan kvanton. Fakte, ĉar antaŭe oni havis ian ideon, ke tabakfumado ne estas tiel grava problemo, tial homoj iom neglektadis tion. Nuntempe oni havas informojn, kaj senduban konscion pri la damaĝo de tabakfumado kontraŭ sano. Estas same grave, ke lernejoj tion substreku kaj efektive organizu agadojn por helpi gejunulojn

koni kaj eviti ĝin”.

Dankon, d-rino Mônica. Ĉe lernejoj de Legio de Bona Volo kaj en ĝiaj sociedukaj programoj, oni pritraktas tiun temon kun la ĝusta seriozeco. Tio estas nia kontribuo por atentigo, precipe al estontaj generacioj, pri la detrua efiko de tabakfumado.

---

\*José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵaneiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Respubliko Albanio : 54.000 infanoj trudataj al laboro



18/05/2013

Laŭ freŝdata studaĵo, 54.000 infanoj estas trudataj al laboro en Albanio kaj 65,8% el tiuj neplenaĝuloj laboras en riskaj sektoroj, povante endanĝerigi sian sanon. La knaboj estas pli tuŝataj ol la knabinoj.

Albanio laborigas 54.000 el siaj plej junaj civitanoj, kaj 35.000 inter ili plenumas danĝerajn laborojn. Tiuj ciferoj estas la lastaj datenoj el nacia studaĵo « La infanoj kiuj laboras en la Respubliko Albanio », realigita de la Instituto de statistikoj (Instat) kaj la Internacia Organizaĵo de Laboro (IOL).

7.319 albaniaj familioj estis sekvataj por la bezonoj de studaĵo kondukita en 2010. 6.003 el la 27.865 membroj de tiuj familioj estis infanoj.

La rezultoj, publikigitaj pasintajn tagojn, montris ke 8,2% el la infanoj aĝaj de 5 ĝis 17 jaroj, tio estas 54.000 infanoj, estas ekonomie aktivaj, kaj ke 80% el la infanoj laboras en la agrokultura sektoro.

Komerco kaj hotela sektoro laborigas respektive 8,2% kaj 4,15% el la infanoj.

#### Plenriska laboro

La studaĵo montris ankaŭ ke pli ol 65,8% el la infanoj laboras en plenriskaj sektoroj. Tiuj riskoj estas kaŭzigitaj interalie per longaj laborhoroj aŭ per danĝeraj laborkondiĉoj.

« La 5 ĝis 13-jaraj infanoj, kies laboro estas malpermesata de la internaciaj leĝoj, konstituas 28,5% el la infanoj kiuj laboras en Albanio », precizigas la raporto.

Aliaj riskoj koncernas la perfortaĵojn pri kiuj suferas tiuj infanoj : turmentadoj, perfortaĵoj kaj fizikaj ekscsesoj. La plej tuŝataj estas la infanoj kiuj laboras favore al proksimuloj aŭ propra familio.

Aliaj danĝeroj evidentiĝas, aparte pri la konsekvencoj de la laboro je tiu juna aĝo.

13% el la infanoj kiuj portempe laboras kaj 18,4% el la infanoj kiuj regule laboras malsaniĝis aŭ suferis pri laborakcidentoj kiuj devigis ilin (por malgranda nombro el ili) ĉesigi siajn studadojn.

Ekstrema laciĝo kaj infektoj estas la plej kutimaj fizikaj problemoj kiujn ili spertas. La junaj knaboj pli suferas de la malfavoraj efikoj de la laboro ol la junaj knabinoj.

<http://balkans.courriers.info/article22459.html>

Chu vere?

Kompreneble en la malriĉulaj familio oni kutimas ke la tuta familio laboru....

ĉefe en la kamparo kiam eĉ infanoj povas akompani gepatrojn en la rikoltado ktp

Tio okazas ankaŭ en Argentino...

Mi naskiĝis en la kamparo... kaj ekde mia infaneco mi akompanis mian

patron en multaj laboretoj... ĉefe post la reveno el la lernejo...

Sed la riĉuloj kaj urbanoj tion ne komprenas...

Tamen kompreneble ĉiuj ni devas esti kontraŭ la ekspluatado de la geinfanaro...

sed se la infano ne havas iom por fari... nun estas tute tempe antaŭ la televido aŭ komputilo...

ĉar pro la malsekureco en la stratoj ili ne plu povas ludi kiel iam ni tute libere faris....

"gens humana ruit per vetitum nefas".... skribis HORATIUS

kiam spektis la Roma imperio komencis fali....

Saluton al vi ekde Argentino.

elkore

Ro

Ro.Sartor

rosartoro@gmail.com

Beletraĵoj

Ismail Kadare

La generacioj de Hankonatoj

Tradukis Tomasz Chmielik

Kelkaj ĉapitroj



10

Post la morto de la patro la junaj Hankonatoj eklaboris kun granda fervoro kaj komencis multoblige sian riĉaĵon. Tiun jaron estis diskonigita la nova ordono pri salvendado, kiu plialtigis la imposton de unu akĉo\* por tri ledsakoj da salo ĝis unu kaj duona akĉoj. Komence ili ĉagreniĝis pri tio, eĉ

---

\* akĉo - monunujo en la osmana ŝtato.

intencis ĉesigi la salvendadon, sed ili memoris, kiel la patro petegis en la mortolito, ke ili ne forlasu ĉi okupon, ĉar la rado de la fortune ne ĉiam turniĝas al prospero. Do, ili obeis. Ili ankaŭ plu kulturis teron sur Kosovo Pole.

Kune kun ĉi tiu salimposto trafis ilin ankoraŭ unu sortobato: ilia fratino forlasis la edzon kaj revenis hejmen. Ili faris ĉion por devigi la familion de la edzo, ke li akceptu ŝin denove, sed tiuj ne cedis. Iuj flustradis, ke ili kverelis pri la doto, kaj multaj diris, ke estis tute alia kaŭzo. La fratoj klopodis ankoraŭfoje edzinigi sian fratinton, rapide por savi la honoron. Sed ne estis facile. La familioj, loĝantaj de la nememorebla tempo en Gjirokastra, malfideme traktis ĉi tiujn venintojn, kiuj ĉiam rapidis. Ĉi tie la homoj ne alkitimiĝis al tia urĝo. Dio decidas, kio okazas, kaj tiuj Hankonatoj volus ŝanĝi la Dian ordon. Tio plaĉis al neniu. Ne vane la maljunaj homoj diradas: Hundino, kiu hundojn postkuras, naskas blindajn idojn.

Kiam la filino forkuris de sia edzo, tio rompis ŝian maljunan patrinton, kiu estis malsanema. Sed fine kadio Abdulkadir, sepdek-dujara vidvo, kiu iam gvidis la proceson pri Kosovo Pole, petis la manon de la malbonkondata fratino de Hankonatoj. Ili lasis ŝin al li senhezite. La kadio estis klerulo, libroj en lia domo okupis tiom da loko, kiom duono de la nutraĵprovizo ĉe Hankonatoj por vintro. Ĉiuj estis en la sepa ĉielo, krom la maljuna patrino Sabeko, ĉar ĝojo pli ol malfeliĉo difektis al ŝi la sanon. Denove, unu post la alia, esploris ŝin kuracistoj, venintaj eĉ el Alaĝa Hisar, sed ili ne faris la ĝustan diagnozon. Do, la filoj portis ŝin denove al la maljuna Kadëne, bruligis haŝiŝon, manĝigis al ŝi erinacaĵon, trinkigis brogaĵon el papavkapetoj, sed la sano de la maljunulino ne pliboniĝis. En la sonĝoj ŝi vidis senĉese la botojn de Basri. Ili iras, ŝi diradis, foriras, kaj mi ne povas alkuri al ili.

Iu el la kuracistoj diris, ke se tiuj botoj vere ekzistas, ili devus malaperi, por ne turmenti la malsanulinon. Oni serĉegis en ĉiuj anguloj de la granda domo, sed vane. La maljuna vidvino devis kaŝi ilin profunde.

11

Kiam komenciĝis regado de la nova valio\*, venis severa vintro. Ĉevronoj ĝemegis de frosto, kvazaŭ ili estus vivaj. Oni diradis, ke la antaŭa valio estis pune sendita al Kirk Kilise. Sed neniu sciis pro kio. Laŭ iuj, ke li estis tro kruela, laŭ aliaj, ke tro milda.

La nova valio ordonis ripari la vojon al Janina. Ekĝojis ĉiuj gvidantoj de la karavanoj. Hankonatoj aĉetis du pliajn mulojn por transportado de salo. Samjare la plej aĝa filo, Hatib, rompis kun siaj fratoj. Li ne starigis novan domon, sed alkonstruis korbela al la okcidenta alo, kiu eĉ sen tio estis grandega. La

---

\* valio - estro de provinco, vilajeto.



fratoj ne kverelis pri la divido de la havaĵo. Sed pli bona estus la malkaŝa kverelo ol la sufokata kolerego, dum monatoj pleniganta la domon, de la sterno malsupre, el kiu oni ĉerpadis akvon, ĝis la ĉambro supre, kie ĉiuj kunsidis por trinki kafon. Tio plene ruinigis la sanon de la kaduka, malfortega vidvino. Ŝi enfermis sin en sia ĉambro kaj ne eliris de tie. Eĉ kuracistojn ŝi ne enlasis. Por trankviligi ŝin, oni diris, ke la fratoj konkordiĝis denove. Sed pro ĉi tiu novaĵo ŝi fartis ankoraŭ pli malbone. Ŝi mortis en la tria tago. Oni lavis ŝin laŭ kutimo. Estis vokitaj ploristinoj, ĉar la edzinoj de la fratoj ne scipovis lamenti dece, kaj oni entombigis la maljunulinon apud la bopatrino, ŝia edzo kaj ankoraŭ unu ido de Hankonatoj, bebo de la mezaĝa frato, kiu mortis pasintvintre, eĉ ne unujara. Neĝis tiel dense, ke nefacile ili retrovis la tombojn.

Nun Hankonatoj havis kvar mortintojn sur la urba tombejo Vasilikua, al kiu la nomon donis bazilio, kreskanta laŭlonge de la fera barilo. Sed kvar tomboj ankoraŭ estis tro malmulte, por ke ili fariĝu lokanoj.

12

Post la morto de la maljuna Sabeko la fratoj disiĝis. Kune ili nur kulturadis teron sur Kosovo Pole kaj vendadis salon. Do la kverelo, kiu delonge pendis en la aero, eksplodis eĉ ne unufoje. Ilia bofrato, kaduka Abdulkadir, zorgis, ke ili aranĝu ĉion milde kaj sen kvereloj.

La domo ankoraŭ pli diskreskis. Por ambaŭ pli junaj fratoj, oni alkonstruis po du ĉambrojn al la norda alo. Nun dudeko da infanoj ofte perdiĝis en mallumaj anguloj.

Abdulkadir mortis dum gvidado de la negocoj de siaj bofratoj. Ilia fratino, Shano, fariĝis vidvino. Iu soldato volis edziĝi kun ŝi. Do, la fratoj kunvenis, pritraktis tion kaj donis ŝin kiel edzinon al li. Baldaŭ poste li formariĝis kun militistaro por sufoki ribelon en norda Albanio. Oni diradis, ke la poŝto ne funkcias tie.

13

El la ĉefurbo de la sanĝako\* venis nova dekreto pri peĉo, rokoleo, salo, mezuroj da silko kaj unuoj de pezo. Oni konigis ankaŭ novajn tributojn. Kontraŭ ĉiu ŝarĝo (fruktoj, rizo, mielo, fromaĝo, butero) - du akĉojn. Kontraŭ ĉaro kun ligno - du pecojn da ligno. Kontraŭ sako kun ligno - unu pecon.

---

\* sanĝako - distrikto en la malnova turka imperio.

Kontraŭ kvar duonoj de buĉitaj ŝafidoj - unu akĉon. Kontraŭ vendita ĉevalo - de la vendanto kaj de la aĉetanto po du akĉojn. Kontraŭ vendloko en bazaro - de virino unu akĉon, de viro du akĉojn.

En la malsupra kvartalo loĝis grandaj familioj el nordo, kiuj konfesis samtempe katolikan religion kaj islamon. Ĉiuj estis scivolaj kaj deziris tion vidi. Baldaŭ ili elreviĝis. Tiuj homoj estis kiel homoj: kun nazo kaj okuloj. Sed estis por ili malfacile imagi, kiel en unu animo povas troviĝi du religioj. Eble pro tia dueco ili ŝajnis portantoj de mistero.

Unu el la novaj venintoj aĉetis ruinigitan domon proksime al Hankonatoj. Ili nomis lin Ali Shkreli, sed oni diradis, ke ŝajne li nomiĝas Ali Sankta Karlo, ĉar post siaj preĝoj en la moskeo li iris al la meso en la katolika preĝejo. Ni vivos, ni vidos, respondus Sabeko kaj trovus ankoraŭ unu kaŭzon por ĉagreniĝi.

14

La novaĵo, ke la tria edzo de ilia fratino, Shano, pereis en la milito, venis kun distingiloj. Okazis la abunda festeno. Dum jaro Shano estis vestita funebre. En marto ŝi edziniĝis denove. Ĉi-foje kun doganisto. Du fratoj, mezaĝa kaj plej juna, ne volis konsenti. Oni ne scias kial. Shano revadis pri infanoj kaj finfine kun la kvara edzo ŝi gravediĝis unuafoje. Ŝi naskis knabinton.

Tiutemope en la domo de Hankonatoj edziĝis deko da infanoj. En la saltenejo ne ŝanĝiĝis multe. Nur ke malantaŭe ili starigis fostojn kun tegmento, sub kiu oni metadis sakojn sur la mulojn.

15

En 1728 malfruiĝis la sultana dekreto pri malfermo de la salminejoj. La kaŭzoj ne estis konataj. Ĝi venis nur fine de aprilo. La laboro en la salminejoj komenciĝis tradicie la okan de majo, sed pro la malfrua dekreto la karavanoj kun salo foriris ankaŭ kun malfruo. La profitoj malkreskis duone. Hankonatoj ne kolektis eĉ duonon de la nutraĵprovizo por vintro. Pro kompletigi la malfeliĉon, je la malsano nomata „nigra erinaco”, mortis la edzino de la plej juna frato. Kaskapan. Ŝi estis la plej bela el ĉiuj kvin edzinoj de Hankonatoj. Kuracistoj faris al ŝi du operaciojn. Unue ili eltranĉis duonon de la maldekstra mammo, poste la tutan mamon, sed tio ankoraŭ pli furiozigis la „nigran erinacoon”. Ĝi atakis la korpon de la kompatinda virino. Ŝi mortis fine de septembro. Post teruraj turmentoj. Oni entombigis ŝin apud la bogepatroj.

Ĉi tiu malfeliĉo kvazaŭ denove proksimigis la fratojn. Ili laboregis por akiri tion, kion ili perdis pro malfruo en la salvendado. Kosovo Pole, fekunda kiel ĉiam, donis abunde grandajn maizospadikojn. Ŝajnis, ke ĉio plej malbona jam evitis ilin, kiam okazis io neatendita: la tria frato, Bardhush, diris, ke li intencas pilgrimi al Mekko. Ili klopodis haltigi lin, sed li obstiniĝis. Hejme estis granda malespero. La

edzino kaj infanoj de Bardhush ploris tage kaj nokte. Sed li ne lasis konvinki sin. Oni diris, ke iu hoĝo, kun kiu lastatempe li sidadis dum horoj, konfuzis pensojn en lia kapo. Do, sola kiel fingro, li ekmarŝis fine de novembro, iun ventan tagon sur la vojo al Janina.

Ylljet Alicja

Sloganoj

Tradukis Tomasz Chmielik

Dua ĉapitro

La malgranda viro<sup>2</sup>

(-Burri i vogël)-----)



Iun tagon la magreta Gjini Tosku, el la kvina klaso de la malgranda lernejo en montara vilaĝo, faris eraron, vokita al la tabulo dum la leciono de geografio La kontinento Azio, kaj anstataŭ diri: „Sovetunio estas reviziisma lando”, li respondis „Ĉinio estas reviziisma lando”. Tio okazis en la unua duono de la sepdekaj jaroj. Tiutempe la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio atingis sian pinton.

La instruisto de geografio, bonkora maljunulo nomiĝanta Kujti (Kujtim), rigardis la knabon mirigite, kaj la dekunujara Gjini, vestita pli malbone ol mizere, tuj korektis sian respondon: „Ne, mi petas vian pardonon, sinjoro instruisto, mi volis diri, ke Sovetunio estas reviziisma lando”. La instruisto kapjesis.

Krom ĉi tiu eraro la aliajn informojn pri Azio Gjini ripetis kvazaŭ gurde (tio signifas same kiel en la lernolibro). La instruisto donis al li la noton „tre bone”. Gjini, kontenta, revenis al sia benko, kaj kiam li iris, el la ŝuotruo elstaris la granda piedfingro.

Sekvatage, post la mallonga kunsido de la pedagoga konsilio, la sekretario de la partia organizaĵo en la lernejo, Sabafi, triumfe sin turnis al la instruisto de geografio:

- Nu, Kujtim, finfine vi kaptis ĉi hundidon de Toskuoj?
- Kion vi diras? – demandis Kujtim distrite.
- Nu, kion? Mi atendis, ke post la hieraŭa incidento vi rakontos al ni tion kiel la unua.
- Pri kiu incidento, kamarado Sabafi? – demandis Kujtim serioze.
- Des pli malbone por vi, kamarado Kujtim, ke vi ludas naivulon.

Kaj li klarigis al la surprizita instruistaro:

- Ĉar Kujtim povas nenion rememori, do mi rakontos, kio okazis dum la leciono de geografio en la kvina klaso. Gjini Tosku, infano el la familio de Preng Tosku, pri kiu vi bone scias, ke ĝi estas la plej malprogesema familio en la regiono – do Gjini diris publike ĉe la tabulo, ke „Ĉinio estas reviziisma lando”.

La instruistoj senspiriĝis.

Kujtim – rememorinte tiun lecionon – ekridis kaj diris:

- Nun mi jam scias, pri kio vi parolas, kamarado Sabafi. Bedaŭrinde vi estas misinformita. Mi rememoras tiun okazaĵon aŭ incidenton (nomu ĝin kiel vi volas) – kaj ĝi sekvis el tio, ke Gjini, kiu estas unu el la plej bonaj lernantoj en la klaso kaj ĉiam bone konas ĉiujn temojn de la lecionoj, vokita al respondo kutime parolas unuspire kaj pro hastemo perdas vortojn. Do, anstataŭ respondi „Sovetunio estas reviziisma lando” li diris erare, ke Ĉinio. Kompreneble li tuj korektis sian respondon. Mi ankaŭ scias, ke li apartenas al la familio de elklasigitaj kulakoj, sed mi ripetas ankoraŭfoje, ke tiu faro estis nek celita, nek intenca.

- Unue – eksplodis Sabafi – povas esti, ke vi havas – kiel vi diras – dum viaj lecionoj miraaaaklajn lernantojn – (ĉi tie Sabafi plilongigis moken la sonon „aaaa”), sed dum miaj lecionoj ial mi ne vidas ilin, ĉe mi Gjini Tosku havas la notojn „tri”, ĉar li scias pli multe. Due kaj plej grave, mirigas min la maniero, laŭ kiu vi, kamarado Kujtim, simpligas la aferon. Ĉi tie, en nia lernejo, okazis io eksterordinara, pri kio mi devas tuj sciigi la Partian Komitaton en la regiono kaj la Fakon de Edukado, dume vi sidas indifere, kvankam vi devus tion prezenti kiel la unua. Pli malbone, mi vidas en vi la klopodon defendi ĉi merdulon! – En la voĉo de Sabafi aŭdiĝis minaca tono.

- Nu, kiu defendas lin ĉi tie! – Kujtim eksentis sin ofendita. – Mi ripetas ankoraŭfoje: estis nur misdiro. La eraro, pri kiu ne estas necese politikumi. Ni povas ja iri al la klaso kaj demandi la lernantojn.

- Ni faros ankaŭ tion! – kriis Sabafi. – Sed unue ni aŭskultos, kion Gjini diros al ni. La infanoj, kiel vi scias, estas pli sinceraj ol iliaj gepatroj aŭ hipokritaj plenkreskuloj – li mokis pri la ŝokita Kujtim.

- Bone – entrudiĝis la direktoro, kiu silentis ĝis tiu momento. – Al vi, kamarado Sabafi, mi konsilus esplori ĉi aferon precize. Ne ĉar mi opinias, ke vi malpravas. Sed vi mem vidas, ke instruisto Kujtim nenion konfirmis, kaj povas fari nenian decidon sen unuanimeco, Do, unue ni preparolos la aferon de Gjini Tosku en nia rondo, kaj poste mi sciigos la Fakon de Edukado en la distrikto, ĉu bone?

- Mi apogas tion plene – respondis obstine Sabafi.

- Ankaŭ mi konsentas – diris Kujtim kaj eliris terurige, ĉar li imagis, kio povus okazi, se la afero estus pritraktita tiel, kiel volis Sabafi.

Ĉiuj sciis, ke Sabafi malamas Toskuojn ne nur pro la politikaj kaŭzoj, sed ankaŭ pro sia kampula furiozo. Oni diradis, ke li perfortis fratindon de Toskuoj. Poste ŝi akuzis lin antaŭ la tribunalo, sed li ne estis kondamnita pro la „manko de pruvoj”. La familion de Preng Tosku oni traktadis en la vilaĝo kiel eble plej malbone. Unu frato de Preng mortis en malliberejo, la alia forkuris eksterlanden.

Preng estis la plej silentema vilaĝano. Ofte li staradis en la vico antaŭ la vilaĝa bakejo, en kiu homoj atendadis panon dum horoj. Longe restis en la memoro lia vizaĝo sen esprimo, kiam li rigidiĝis en torentoj da malvarma pluvo, kun akvogutoj falantaj de la okulharoj. Fine, kiam li antaŭeniĝis, kutime la vendistino – unu el la plej fervoraj kaj malicaj komunistinoj en la vilaĝo – diradis triumfe: „La pano finiĝis, Preng. Venu morgaŭ!” Kaj tiam, sen montri sian elreviĝon, silente li revenadis hejmen kun malplenaj manoj, kaj la sekvan tagon, same kviete li staradis denove en la vico sub pluvogutoj falantaj de la tegmento. Kaj kiam finfine li ricevis panbulon, lia vizaĝo esprimis nenian senton.

Preng estis dungita en la lignotenejo. (lignotenejo) Dum laboro ofte helpadis lin Gjini. Kune ili portadis trajojn kaj estis io varma kaj mirinda en tio, kiel silente kaj interkomprenige nur per gestoj, ili zorgadis, ke unu ne metu pli grandan pezaĵon sur la dorson de la alia.

Lun fojon, antaŭ la komenco de la malferma popol-kunsido, la partia sekretario atente rigardis en la ĉambro-finan kaj montrante per fingro la starantan tie Prengon li kriis: „Rigardu, kamaradoj, kiu honorigis per sia ĉeesto nian popol-kunsidon – Preng Tosku!”

La homoj turnis sian kapon kaj miregante rigardis la patron kaj la filon. Preng staris muta kiel roko, Gjini, al kiu brilis la okuloj, tenis la manon de la patro. Ili atendis, kio okazos. Kiel ŝajnis, Preng ne komprenis la aludon de la sekretario.

- Do, kion vi serĉas, estimata sinjoro, ĉi tie? – mokis la sekretario. – Ĉu vi ne komprenis, ke la popolo de nia vilaĝo kunsidis tiucele, por decidi, kiel ni dividos kampojn de la vilaĝaj kulakoj?!

La partia sekretario, kontenta pri tia spritaĵo, ekridis laŭte. Post momento aliĝis ĉiuj en la ĉambro. Nur nun Preng vidis klare, ke ili forpelas lin el la kunsido kaj li eliris en la pluvon, tenante sian filon je la mano.

Ĉio okazis semajnon antaŭ la kunsido de la pedagoga konsilio „pri la incidento kun Ĉinio”. Enirinte post la kunsido en la klasĉambron, Kujtim tuj rememoris pri la okazaĵo. Li rigardis kaŝe



Gjinion,(Gjinon) kiel li elprenas librojn el la tola sako, kaj suspiris en la animo: „Por kompletigi vian malfeliĉon, povra knabo, ankoraŭ mankis al vi Ĉinio”.

Kujtim sentis, ke li ne havos sufiĉe da forto por defendi Gjinion(Gjinon) antaŭ la atakoj de Sabafi. Li komprenis, ke ĉi tiu infano distingiĝas inter la aliaj per la „malinda deveno” – du malbonaŭguraj vortoj, nekomprenablaj al la infana menso. En la profundo de la animo li sentis, ke neniu ŝatas Gjinion, (Gjinon)nek lian familion, ke ĉiuj timas ilin. Do, ĝuste tial la knabo ne ludis kun siaj kolegoj sur la korto, en la lernejo li evitadis la aliajn knabojn, kaj posttagmeze li iris paŝti bovinon, kun lernolibro en la mano.

Post la leciono, irante tra la koridoro, kvazaŭ hazarde, Kujtim demandis Gjinion (Gjinon):

- Vidu, mi estas surprizita, ke en la klaslibro, vi havas tiom da malbonaj notoj ĉe sinjoro Sabafi. Nu, kial?

Rigardante infane, Gjini respondis:

- Mi klopodas, sed al mi ŝajnas, ke vane.

- Ĉu vere? – malcedis Kujtim. – En la aliaj lecionoj vi havas nur tre bonajn notojn. Kaj eble sinjoro Sabafi havas ion kontraŭ vi aŭ via patro, aŭ iu alia?

- Ne, sinjoro. Mi ne scias pri tio.

Kujtim povis nenion diveni laŭ tiu senkulpa vizaĝeto de la knabo.

- Diru, vi ne estas malsaĝa... Parolante sincere, mi havas la impreson, ke sinjoro Sabafi malŝatas vin.

- Eble, sed mi ne scias pri tio – respondis Gjini kviete.

La sekvan tagon dum la longa paŭzo Sabafi informis la instruistaron pri „malgranda konfronto”. Li enkuris la direktoran ĉambron, posttirante je la mano la vakspalan Gjinion.(Gjinon)

La knabo ŝajnis tiel infaneca.

- Eniru, Gjini, eniru – Sabafi ekpuŝis lin antaŭen, por ke li stariĝu vidalvide de la instruistoj. La timigita Gjini similis al leporeto en la grego da lupoj.

Sabafi(Sabafi) impresis, ke li ĝojas.

- Gjini, timu nenion, hodiaŭ ni ne kunvenis por doni al vi punon pro ia krimeto. Nur rakontu, kio okazis dum la leciono de geografio kun instruisto Kujtim, kaj poste vi iros ludi pulkon(pilkon), ĉu bone?

La vizaĝeto de Gjini esprimis nenion. Senĉese li estis gardema, rigardis jen Sabafion, jen aliajn instruistojn. Li provis kompreni, pri kio li estis venigita.

- Nu, diru al ni, kiu hejme ordonis al vi respondi ĉe la tabulo: „Ĉinio estas reviziisma lando”.

- Neniu, sinjoro. Mi ne diris tion, neniu diris tion al mi hejme, nek ie.

Ĉi-tage Sabafi estis pacienca.

- Gjini, vi ja vidas, ke ni volas fari al vi nenion malbonan, kaj mi traktas vin delikate kiel ovon, multe pli bone ol kutime, ĉu ne?

Gjini kapjesis.

- Kaj nenio okazos – daŭrigis milde Sabafi – nek al vi, nek al via patro, nur diru, kiu petis vin pri tio kaj estos la fino. Vi ne estas sufiĉe aĝa, por kompreni, kiu en la mondo gvidas la socialisman politikon, kaj kiu postulas la revizion de la principoj de marksismo-leninismo.

- Aĥ, ne, sinjoro, mi diris nur tion, kion mi trovis en la lernolibro, kaj mi scias, ke Ĉinkio(Ĉinio) estas socialism lando.

- Ne estas necese, ke vi memorigu nin pri tio, kia lando estas Ĉinio – Sabafi perdis la fridan sangon. – Nur diru al ni, kiu instruis al vi paroli tion, kion vi diris en la klasĉambro.

Nenio povis devigi tiun malgrandan knabon al la konfeso, ke iam ajn li diris tion, sed Sabafi pliseverigis la demandadon:

- Nu, bone, sed kial instruisto Kujtim konfirmas, ke vi diris tion?

Gjini rigardis timigite Kujtimon kaj obstiniĝis tremvoĉe:

- Ne, sinjoro instruisto Sabafi, mi ne diris tion, mi nur diris...

Li komencis cedi. Sabafi povis finfine malbridi sian ĉasistan kapablon:

- Nu, Gjini, mi vidas, ke vi jam kondutas tiel, kiel estas dece, Mi diras malkaŝe, mi havas nenion kontraŭ vi kaj via patro. Nur kontraŭ tiu, kiu instruis vian patron, ke Sovetunio estas lando socialisma, mi volis diri kapitalisma – perdiĝis Sabafi.

La direktoro – silenta ĝis nun – interrompis afable: - Reviziisma, kamarado Sabafi.

- Jes, jes, reviziisma, estis la misdiro, dankon – respondis malmilde Sabafi, ne vidante, ke ĉio miksiĝis por la aliaj, kaj li daŭrigis: - Nu, Gjini, kiel vi pensas, kial Sovetunio estas reviziisma lando?

- Ne, sinjoro instruisto, neniu diris tion al mi – Gjini ploris.

Estis necese havi ŝtalajn nervojn, por ekkredi, ke la knabo diros, ke iu hejme instruis al li paroli: „Ĉinio estas reviziisma lando”

La manoj de Sabafi tremegis pro furiozo.

La instruistoj komencis interflustri, sed neniu kuraĝis entrudiĝi.

- Ni jam lasu ĉi aferon, kamarado Sabafi. Vi vidas, ke li konfesis nenion kaj ni vane perdas tempon ĉi tie – diris fine la juna instruistino de angla lingvo.

Hola, fraŭlino – interrompis ŝiajn vortojn Sabafi. – Ni kapablas paroli ankaŭ en alia lingvo! Tiu kulaka bubaĉo jam ne mokos! – kaj furioza li atakis Gjinion(Gjinon)

- Gjini Tosku! Pripensu ĉion! Vi kaj via patro bonege scias, kiu estas Sabafi Keci kaj la Partio, kiuj eĉ el la faŭko de serpento kapablas elpremi (elpreni)la tutan veron. Aŭ vi tuj diros, kiu instruis al vi tiajn parolojn, aŭ mi turmentegos vin kaj vian familion tiel, ke ne eltenos vi, nek via patro, kiu per tiaj sloganoj venenas pensojn en via kapo. Tre bone vi scias, ke mi ne cedos. Kaj se vi ne scias, do mi scias, kiamaniere pereigi vin. Mi pensas, ke en la familio Tosku – mi volis diris(diri): gento – estas bone konata la ĵipo de la sekurservo(sekurecservo), kiu veturadas al la vilaĝo?(.)

Gjini, kun la okuloj senĉese larmoplenaj, rigardis jen Sabafion, jen aliajn instruistojn.

La kampula instinkto diris finfine al Sabafi, ke en la mondo ne estas tia potenco, kiu devigus la knabon al la kulpokonfeso. Li flustris subnaze „Ankoraŭfoje ni pritraktos ĉi aferon...” kaj li turnis sin denove al Gjini:

- Sed morgaŭ, ci reviziista demagogo, bonvolu konduki vian patron al la lernejo. Kaj nun jam malaperu! For de miaj okuloj! – kaj sen vorto de klarigo li eliris kiel la unua el la direktora ĉambro, kaj post li ĉiuj instruistoj.

Gjini forlasis ĝin kiel la lasta. Li iris preni sian sakon kun libroj.

Sur la ludejo proksimiĝis al li klaskolego:

- Nu, Gjini, kion ili volis?

- Aĥ, nenion gravan.

- Ĉu vere, do kial vi ploras?

- Aĥ, estas nenio, vere nenio – kaj li foriris, plaŭdante flakojn per siaj piedoj, kun tola sako ĵetita sur la ŝultron.

Luljeta Lleshanaku

Poeziaĵoj

Tradukis Tomasz Chmielik



Lundo en sep tagoj

(E hëna në shtatë ditë)

Lundo estas kiel ŝuo el la malsama paro,

la alian mordas hundo kroçita al çeno.

La sunolumo trudeme enpremiças tra la pordeto

kaj ŝutiças kiel grenŝeloj surteren.

Sur la ŝtona deklivo, la vojon nenien,

iras rektiçintaj viroj

kun manoj surdorse,

kiel siluetoj en pafejo,

sufiças haltigi la spiron, por ke ili estu trafitaj.

Ilia salivo plu amaras de kafo,

sur la kolumetoj - barilo kun skvametoj de kapohaŭto

aŭ blanka flago de kapitulaco.

Dum semajnoj ne falis pluvguto. La unusola torento ŝvelas per ŝankroj.

Knabeto dekroçiças de la patrina mano - li ne volas iri al la lernejo.

Naŭjara, per fingroj nigraj de verdaj juglandoj

li kalkulas, kiom da jaroj pasos, antaŭ ol li soldatservos.

Ĉe dek li perdiĝis.

Li desegnas en polvo grandan, malpuran cirklon

kiel pecon da malsana haŭto,

el kiu oni devas eltranĉi tumoron.

II

Kiel salmoj pretaj al frajado

naĝas el maro en riveron,

same nuptogastoj retropaŝas en la historion,

kiam sekvatage ili revenas bedaŭrantaj

kaj kun mallevitaj okuloj petegas la mastrinon redoni iliajn haŭtojn:

„Mia estas neĝblanka, kun manikuro!”

„Mia estas delikata, kun marko bruligita sur la antaŭbrako per gladilo!”

„Mia odoras je salvio, neamelita kaj mankas substofoj!”

„Mia estas magia kaj reversebla!”

„Bonvolu doni ian ajn, tio ne havas signifon!”

Jen Mustafo ebriulo...

kun la kapo iom klinika dekstren.

Lunda Sanktulo. Oni povas kuligi lin pri ĉio,

ĉar li ensorbos ĉiun sakron

kiel alkoholon tampono

antaŭ ol ĝi estos merita sur la vundon.

### III

Antaŭ la dormo la mondo reperas sub la palpebroj  
kiel militistoj sub la triumfarko sataj de la propra vanteco.  
fine de la kolono - la predo –  
ĉiunokta rito de kuniĝado,  
disrompita muziko,  
sufiĉanta por forgesi,  
kial ni vekigis hodiaŭ matene,  
kaj precipe kial ni devos ellitiĝi morgaŭ.

La lampo estingiĝas por la lasta fojo  
kaj sango komencas sian malgrandan cirkuladon.

### IV

La domo estis malplena, kiam mia avinjo venis kiel juna edzino.  
Nenio krom pafiloj sur la muroj kaj bona nomo.  
Ŝi devis apogi la kapon per la forto de siaj brakoj,  
por konstrui urbon nur el tio.  
En la komenco ŝi plantis unu abrikotarbon ĉe la domo,  
kaj poste la alian. Ili estis kiel netrapasebla limo  
aŭ manoj premitaj al la vizaĝo,  
por varmigi ĝin per la rebatitaj spiroj.  
Poste el ŝia korpo gutis infanoj



Kiel pluvo el la pajlotegmento.

Pri tiuj, kiuj falis sur la molan teron, oni forgesis.

Feliĉon havis tiuj sur la betono.

Ili postvivis.

Kaj eternigitaj sur la sepiokolora foto,

en striitaj jakoj kaj pomaditaj haroj kun disigo,

ili sentas sin fremde ĝis la nuna tago

kvazaŭ el la pruntita vivo

V

Mi havis difektitajn ludilojn:

ĉinan ĉareton de glaciaĵ-vendisto kaj mekanikan zebbron –

la novjarajn donacojn de mia patro.

Kiel kremkukoj lekataj kaŝe en la kuirejo

ili havis nenian valoron,

ĝis mi difektis.

Tiam mi malfermis iliajn ventrojn,

Mi esploris radetojn kaj malgrandajn bateriojn,

ne sciante, ke mi faras la unuajn paŝojn sur la vojo

al la kompreno de libereco.

Kiam unuafoje mi ekvidis la veran bildon,

mi faris instinkte kelkajn paŝojn sur la piedfingroj malantaŭen,

por trovi ĉi tiun morto-punkton,

tra kiu mi povus enpenetri en la esencon de la aferoj.

Pri homoj okazis alie,

homojn mi mem konstruadis.

Konscie mi ne amis ilin ĝis la fino.

Neniu tuŝis per la kapo la bluan plafonon

kiel ne finkonstruita domo sub plasta tukego

antaŭ la sojlo de la pluva aŭtuno de mia kompreno.

VI

Jen la honestulo, senmakula,

kun la vizaĝo, de kiu oni forfrapis precize ĉiajn eretojn

kiel de piknika plejdo.

El tiuj, kiuj akceptas ĉiun laboron:

„Ĉu iu havas najlon por enbati ĝin

en mian bruston?”

Samaj estis mia prapraavo

Kaj la avo, kaj la patro...

Eble la samajn okupojn elektos ankaŭ lia filo,

kiu ĝuste enbatas rigardon en la malestimatan patron.

(„Pli bonas fali subteren!”

- ĝemas la patro).

„Ĝis kio mi venos?” – demandis la filo iun tagon.

„Ĝis tio, ke vi ne perdiĝu!”

Povis esti sonĝo, ĉar lia genealogia arbo

forbrulis per fulmo,

antaŭ ol la karmelaodoro de katsuropenetrus tra la vilaĝo.

VII

Laodoro de radikoj. Pluvoj revenas

Samtempe kiel abeloj al la ujo.

En nia familio oni distingas pluvon feliĉan

de tiu melankolia, kiu somere ruliĝas super la montetoj. Jen la tradicio.

Mi aŭskultas per unu orelo por aŭdi min pli bone.

La oĉjo petas min pri fazoletto, li volas trafroti siajn okulvitrojn.

Li uzadas ĉi vorton, de kiam li revenis el Florenco,

Kiel oni kuracis lin el pulmito –

tiun tempon li rememoras

kiel mielmonaton.

Nun li tenas mian ateston,

sango pulsas en liaj tempioj - estas la afero de la vivo aŭ morto.

De ĝi dependas,

ĉu li rekonos min

kiel brikon por muro

aŭ kiel ŝtonon por garbejo.

Lia mano batpreta

estas instrukcio pri uzado, kiun oni legas nur unufoje.

Kvankam sulkoj sur lia polmo – linioj de lia sorto –

Kiel unusolaj ne postlasos sur mi spurojn.

Diablo ĉi tion pren! Alportu fazzoletton por mi!

VIII

Se vi havas nigran haŭton,

via rideto estas neĝblanka.

Oni ne povas rideti duonbuŝe, nek dentobreĉe.

F. scias tion. Ŝi funebras pri la filo.

Frumatene ŝi malfermas la fenestron, bruligas oleoforneton

kaj per la peco de la ĉifita telegramo,

kiun ŝi tenas senĉese,

ŝi balaas la korton, nutras kokinojn, kuiras manĝaĵon kvazaŭ por dek viroj,

poste ŝi starigas la seĝon kaj kiel sfinkso rigidiĝas kontraŭ la pordo.

Tagon post tago, kiel akcipitro ŝi kroĉiĝas al la ordo kaj formo

kaj kiel sekretaj cirkloj en la tritiko-kampoj

tentas ĉi tiun, kiu ŝvebas en la aero senkompate,

ne tuŝante la teron.

Ŝi reciprokas salutvortojn rigarde.

La vojo malfermiĝas antaŭ ŝi

kiel dimanĉo en la procesio de la tagoj  
oferata al la preĝo kaj melankolio.

IX

Meze de la aferoj vi estos plej Sekula – diradis romanoj.

Brodita tuko meze de la tablo.

La tablo meze de la tapiŝo.

La tapiŝo meze de la ĉambro.

La ĉambro meze de la loĝejo.

La loĝejo meze de la domo.

La domo meze de la urbo.

La urbo meze de la mapo.

La mapo meze de la tabulo.

La tabulo meze de nenio.

Lola estas anĝeleto. De kiam ŝi finis ok jarojn, ŝia frunto ne kreskas,  
plu havas la saman gravito-mezon. Ŝi ŝatas angulojn, randojn,  
kvankam ĉiam ŝi staras meze de la buso,  
kiam homoj interpremiĝas antaŭ la pordo.

Miaj najbaroj neniam vizitadis lernejon,

aŭdis nenion pri estetiko

kaj mi dubas, ĉu ili legis pri la tero-akso, simetrio kaj absoluta vero.

Sed instinkte ili turnas sin al la mezo

kiel la kapo de Ŝimŝon al la sino de Dalila,  
kiu ruze senigos lin je la forto,  
antaŭ ol tagiĝos.

X

Preparoj al vintro ne estas kutimo,  
sed instinkto. Ni liberiĝas de superflujaj timoj  
kiel grundinta ŝipo de balasto.

Taedium vitae estas loka eco, tio ne koncernas nin,  
post kiam nur laodoro de kuirataj fazeoloj apartigas nin de la najbaroj,  
kaj de la prauloj nia sonĝo super la forno.

Inter mi kaj miaj kapabloj estas neniu perilo,  
al ĉio kaj ĉiuj la vento aŭguras nazovoĉe falsan profeton.

Jaroj transkapiĝas sur la glacikovrita deklivo,  
instinkte kaŝante la kapon inter la genuoj.

La limoj velkas. Mia korpo pli kaj pli abstrakta ol iam ajn  
estas patrolando sen himno,  
mi tuŝas ĝin en la antaŭmorta deliro  
kiel patrino buŝo la varmegan frunton de infano...



Gravas nur

postvivi.

La domo perdita en nebulo

aŭ herbo kuracanta la okulojn trafitajn per fulmo



I

mi trapasas la sojlon kaj diras al mi

ho kiel longa vojo ĝis la lasta pordego

de tiu domo perdita en nebulo

sursojle homo en nigra vesto

klinas la kapon kaj parolasmia sinjoro ne vivas

la sinjoro ne vivas mi ripetas flustre

lia sinjoro mia sinjoro ne vivas

kaj la vojo tiom longa

ĝis la lasta pordego de tiu domo

perdita en nebulo

tiaj migrantoj kiel mi senĉese venadas  
haltas por vidi la malnovan internon  
la konstruaĵon de la prauloj de tiu sinjoro  
mi stariĝas antaŭ homoj vestitaj nigre  
kaj per la tremanta buŝo mi parolas malhaste  
nia sinjoro ne vivas  
ne vivas la sinjoro via sinjoro  
mia sinjoro ne vivas delonge  
sed ĝis la vojo kondukos al la lasta ido  
de la sinjoro de tiu domo perdita en nebulo  
ĝi ne havos la finon

II

en la ĝardeno iam plena de floroj  
mi rigardas argilan vazon  
kreskis tie mirinda herbo  
oni diras ke homoj el tiu malnova domo  
perdita en nebulo  
kuracadis per ĝi siajn okulojn  
sed de kiam trafis ilin fulmo  
de kiam ĝian sukon  
fortrinkis la sekega tero  
la blindaj sinjoroj  
ne sciis kio estas lumo

de buŝo al buŝo de gento al gento  
estas transdonata legendo  
pri homo kun bastono serĉanta iun  
migranta tra la malplenaj kampoj de Torviolli\*  
oni diras ke li iradis tage kaj nokte  
senĉese vokis iun per nomo  
sed respondis neniun  
de kiam li malaperis  
dronis en nebulo super la kampoj  
la homoj el la granda domo  
ŝlosis la pordojn de siaj ĉambroj  
kaj ne sciis kio estas lumo

III

piede de Korab\* malplena domo  
kaŝas propran funebron en muĝo de Radika\*\*  
proksime al la domo ĉirkaŭvolvita per nebulo  
proksime al la pordego  
kie homoj nigre vestitaj nutras sin per espero

---

\*La kampoj de Torviolli - loko de la venka batalo de Skanderberg, kreinto de la albana ŝtato en la 15a jarcento, kontraŭ turkaj trupoj.

\*Korab - monto en Albanio, proksime al la urbo Dibër.

\*\*Radika - makedona rivero.

iun fojon  
kun manoj sur la kapo  
fuĝis la sinjoro de ĉi tiu domo  
li tenis sian fezon  
kontraŭ forta vento blovanta tien

same centoj da aliaj domoj  
kaŝis propran funebron en muĝo de Radika  
en ĝiaj malkvietaj ondoj  
kuniĝante kun aliaj funebroj  
ili hastis laŭ fluo kaj falis kun akvo  
de tiam - oni diras -  
multaj torentoj kaj la rivero  
grimpis supren  
ĝis ili sekiĝis iun tagon  
- baldaŭ la sinjoroj de la domoj  
forlasis ŝafaron

IV

nun mi vagas tra la porda labirinto  
de tiu domo kovrita per skvamoj  
antaŭ ĉiu pordo  
homo en nigra vesto  
mi haltas por saluti lin

sed mi tremas kvazaŭ febre  
mi diras la sinjoro ne vivas  
kaj la domo staras forlasita  
- vi ne estas solaj  
ni estas kun vi

poste mi trapasas ankoraŭ unu sojlon kaj vidas  
ie proksime troviĝas la lasta pordego  
iam mi alvenos tien estos multe da homoj  
el tiu domo funebranta  
kaj enfermita en la soleco de nebulo  
mi klinos la kapon antaŭ ili  
ili diras ke kiam malfermiĝos la pordego  
ni vidos vastan ĝardenon  
kaj mirindan herbon  
trafitan per fulmo en la malgaja tempo

tie la sinjoroj de ĉiuj domoj  
kuracos siajn okulojn

Anekdotoj

Okazis terura afero -- kuras skota sinjorino al la edzo.

-- Nia fileto glutis unupencan moneron.

-- Ne gravas -- venas la respondo de la edzo --, ja li havos morgau naskightagon.

Esperantigis Imre Szabo.

Du knabetoj interparolas:

-- Mia patro estas vera bonulo! -- fanfaronas la unua.

-- Chu tion vi diras al mi? -- replikas la alia

-- Antaŭ nur du jaroj li estis mia patro.

Esperantigis Imre Szabo.

--

En la Universitato estas periodo de rigoraj ekzamenoj. La Sinjoro Profesoro alparolas iun tre malbone preparitan junulon:

-- Vidu, mi petas, Aleksandro la Granda en via aĝo jam konkeris la mondon!

-- Jes ja, sed lia profesoro estis Aristotelo mem.

Esperantigis Imre Szab

Turisto en Parizo volas volas vidi la Eiffel-turon.

-- En la dua strato maldekstren -- klarigas lokulo al li -- kaj dekstren, poste rekte, kuraghe kaj ne flankighante, kaj baldau vi ekvidos ghin... Vi neniel povas mistrafi ghin, ja ghi estas tuj apud la vendisto de varmaj kolbasetoj.

Sinjoro vi havos teruran tortur-morton. Vi estos buchita per longklinga tranchilo, senhararigita per flamoj, vi estos distranchita, dishaketita...

-Sinjorino, atendu momenton, mi deprenos la prokoledajn gantojn...

Pardonu min sinjoro, chu vi povus diri la ghustan tempon?

-- Estas la kvara horo kaj dudek du minutoj.

-- Estas strange, mi demandadas la homojn jam tuttage, kaj ili chiam diras ion malsaman.

Esperantigis Imrw Szabo.

--

La salongardisto entuziasme klarigas en la muzeo:

-- Kaj jen estas mumio de dek ses-jara faraonidino, kaj ghi estas jam trimil-jara!

-- Pardonu min! -- ekvochas iu el la vizitanta grupo --, chu tiuj trimil jaroj enhavas jam ankau la dek ses?

Nia leganto Teddy alvokis la atenton pri interesa figuro, kiu volas daure mencii fremdajn vortojn por montri sian instruitecon, kaj evidente chio chiam estis fushita. Ni vidu la historion!

Foje vivis iu damo Malvin -- kiu shatis uzi fremdajn vortojn --, sed shi preskau neniam sukcesis kapti la konvenan.

Foje ion demandis iu de shi -- shi devus respondi, ke shi ech la plej palan ideon ne havas. Nu kaj kion shi respondis? -- Mi havas ech ne la plej palan idioton pri tio. -- Ekde tiam shi estis nomata "Pala Idioto".

Alifojе shi parolis pri surstrata demonstracio --, sed che Malvin tio ighis "de'menstruado".

Fine shi volis protesti kontrau io, do shi deklaris:

-- Mi prostituas!

Esperantigante rerakontis Imre Szabo.

En la malfrusomera krepusko:

Pardonu min Sinjoro! Chu vi ne vidis hazarde policiston en la proksimo?

-- Ne.

-- Do, tiel rapide levu la manojn!

Esperantigis Imre Szabo.

--

Gufo pendas kap-al-tere sur brancho. Ghin preterflugas du paseroj:

-- Kian problemon ghi havas?

-- Lasu la povrulon, se mi bone vidas, li havas gravan perturbon en idente



Panjo, chu vi memoras, kiom da energio forrabis de vi, ke vi devis oferi tiom da zorgoj pro tiu granda plankovazo?

-- Evidente mi memoras, kara fileto!

-- Nu, mi mencias la aferon nur tial, char ekde hodiaŭ vi ne plu havos tiun zorgon.

En gastejeto malregistrighas gasto. La akceptisto interesighas che li:

-- Bonan matenon! Kiel vi fartis chi tie?

-- Terure -- respondas la ulo. -- Apenau mi dormis iom. En chiuj 15 minutoj mi vekighis abrupte, char io bruegis.

Baldau venas juna paro, la dungito alparolas ankau ilin:

-- Bonan matenon! Mi esperas, ke vi ambau sukcesis satripozi che ni!

-- Badaurinde ne -- respondas la junulo. -- Iu en la najbara chambro ronkis tiel senindulge, ke ni devis frapeti al li la vandon en chiu kvaronhoro, por ke li chesu.